3-a Jaro. N-o 127—128 APERAS SEMAJNE 5. Marto 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY 14, Avenue de Corbéra, Paris-XIIe	Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, Rue Boyer, Paris-XXe	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

LA SKLAVOKOMERCO EN ABISENIO

En Afriko ekzistas ankoraŭ du t. n. sendependaj landoj: Liberio kaj Abisenio. Sed ŝajnas, ke tia "sendependeco" ne multe profitas al la tieaj proletoj, t. e. sklavoj, kiel montras la ĉi-suba priskribo.

Nure nacia sendependeco povas profiti sole al la regantoj, neniel al la regatoj. Vera sendependeco ekzistos por la laborularo nur kiam forestos ĉia ekspluatado sur la tuta tero. Kaj por forigi la ekspluatadon ne nacia batalo necesas, sed klasbatalo. — Red.



Imperiestra restadejo en la "sendependa" Abisenio



Preĝejo en Harrar ("libera" Abisenio)

La hungara Afriko-esploristo Geza Demeter antaŭ nelonge revenis de vojaĝo tra Afriko kaj publikigis tre interesan raporton.

Bitaŭdari Apta Giorgi, influa politikisto en Abisenio, kiu nuntempe estas militministro, antaŭ kelka tempo esprimis sian opinion pri la forigo de la sklaveco en Abisenio.

Al ĉiuj skribaĵoj, kiujn la grandŝtatoj sendis pri ĉi afero al Abisenio, Apta Givorgi respondis, ke subita forigo de la sklaveco povus konduki la landon al revolucio kaj tiam la terkulturo perdus siajn plej bonajn manojn, ĉar 1 miliono da sklavoj estas okupataj sur la kampoj. En Abisenio nun ekzistas 2 sociklasoj: indiĝenoj, posedantaj teron, okupitaj ĉe ŝtatoficejoj kaj servantaj kiel oficiroj en la armeo, kaj sklavoj, abisenlingve nomataj "gabar".

Ĉi sklavoj devas pagadi impostojn al la terposedantoj, al la guberniestroj kaj fine ankaŭ al la imperiestrino mem.

Estadas 2 specoj da sklavoj: militkaptitoj kaj tiaj, kiaj ekestis sklavoj pro ŝuldopaga nekapableco.

Fine ankaŭ ekzistas infanoj-sklavoj, kiuj tute simple estis venditaj de siaj gepatroj.

Sed la lastan specon de sklaveco la registaro malpermesas.

La registaro mem tre kulpas pri la sklaveco, ĉar ĝi eldonis leĝon, kiu permesas preni en sklavecon pro nepagitaj ŝuldoj, kaj eĉ enkatenigi sklavojn permesas la registaro al la kreditoroj.

Dum nia vojaĝo de Dima al Kapa — rakontas la hungara vojaĝisto — ni renkontis kelkajn sklavkaravanojn. Unu tia renkonto engravuriĝis mian memoron.

En profunda kotaĵo, ĉe forta pluvego ni alvenis praan arbaron. Tie ni ekvidis kortuŝan aperaĵon: meze de bone armita abisenia soldataro ni rimarkis ĉirkaŭ 30 virinojn. Ĉiu el ili sur la dorso portis suĉinfanon, kaj kelkaj ankaŭ kondukis per la manoj infanojn de 8 ĝis 10 jaroj. Malantaŭ ili iris iliaj edzoj, la manoj kaj piedoj ligitaj per pezaj katenoj, ĉirkaŭitaj de abisenaj rajdantoj, kiuj batadis la malfeliĉajn sklavojn per siaj longaj skurĝoj, se ili laciĝis kaj por momento volis ripozi. Profesoro Grühl, germana esploristo, kiu nin akompanis, kriis, ke li pri tio sciigos al la angla ambasadoro, al la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj kaj aliaj. Sed iu el niaj akompanantoj rimarkigis, ke la profesoro ankoraŭ havos la okazon ekkoleri, kiam li renkontos sklavojn mortbatitajn.

Kaj efektive posttagmeze ni trovis sur la vojo kadavron de sklavo, kiu jam estis duone dismanĝegita de sovaĝaj bestoj . . .

Post kelkaj tagoj ni ankaŭ eksciis, ke en la abisenia urbo Derja okazadas regulaj sklavofoiroj.

La prezo por viro en la foiro estas ĝis 30 taleroj kaj por virino 15. Infanoj 10 ĝis 15-jaraj estas vendataj por 5 ĝis 10 taleroj. La plej malĝojinda fakto ĉe tio estas, ke la sklavoj kontentas pri sia stato, kaj se iu proponus forigi la sklavecon, la sklavoj estus la unuaj, kiuj kon-

traŭus tian proponon, ĉar ili sentus sin minacataj perdi sian mizeran panon.

La "gabar", ĉi plej malalta sklavo-speco, estas kiel besto. Kiam li malsaniĝas, al lia mastro ne venas en la kapon, lin kuracigi, kaj tiel li pereas kiel hundaĉo.

Se li estas sana, li devas fari la plej pezan laboron kiel kamelo kaj ricevas por tio tioman manĝaĵon, kiom necesas por ne malsatmorti.

La mortemo ĉe ĉi sklavospeco estas terura. Sed plej karakterize ĉe ĉio ĉi estas — diras la hungara esploristo — ke la plej grandaj ŝtatviroj kaj politikistoj en Abisenio estas kontraŭ forigo de la sklaveco. Ili opinias, ke (gardu dioj!) tio povus okazigi, ke la abiseno mem estu devigata kulturi la teron ...

El "Lodzer Togblat" eljudigis luelmultiuj.

EL JAPANIO

La stato de nuntempa virina edukado

La nuntempa eduksistemo en japanaj lernejoj komenciĝis en 1868, kiam Edikto pri Elementa Lernejo estis proklamata. Malgraŭ la mallonga historio de nur duona jarcento, nia edukado ĝenerale estas en prospera stadio. Tamen tio ĉi estas nur por viro: kaj por virino ni ankoraŭ havas multe da problemoj. En Elementa Lernejo, geknaboj ricevas tute saman edukadon; sed en ĉiu lernejo pli alta ol elementa lernejo, ekzistas multaj diferencoj.

Tia diferenco estas kaŭzita pro tio, ke "Bona edzino kaj saĝa patrino estas la esenca idealo de virina edukado. Knaboj estas edukataj por fariĝi homoj, membroj de socio, dum knabinoj por fariĝi kapablaj hejmmastrumantinoj. Tial knabinoj devas pasigi multe da tempo por kudrado, kuirado, kaj japanaj (ofte ankaŭ ĥinaj) klasikoj. Ili ne havas multan tempon por studi arton kaj sciencon. Knabinoj ne estas edukitaj kiel kunulinoj de viroj, kiuj povas labori por socio kaj hejmo: ili plejparte estas edukataj kiel servistinoj, kiuj penas plaĉi al viroj per sia tuta forto.

Tiu malvigla melankolia ideo de konservativa, feŭda edukado estas tute sen-igita je la moderna viveca ideo pri libereco, emancipo, kaj la ekonomia ŝanĝo de la moderna industria reformo. Virinoj komencis partopreni ekonomian aktivecon kaj helpi al homa civilizacio. Virina edukado nun estas unu el la plej gravaj aferoj en Japanio. Oni klopodadas por reformi knabinan liceon, pliprogresigi altan liberan edukadon, akirigi egalan situacion kiel viroj. La stato similas al tiu en Germanio antaŭ 20 jaroj.

Lernej-sistemo

Elementa Lernejo		dum 6 jaroj	7—13 jaraj geknaboj
Liceo	por knaboj	dum 5 jaroj	13—18 jaruloj
Industria Lernejo	por knaboj	dum 4 jaroj	13—17 jaruloj
Knabina liceo (nomita "alta knabina lernejo")		dum 4—5 jaroj	13—16, 17 jarulinoj
Praktika knabina lernejo		dum 4 jaroj	13—17 jarulinoj
Kolegio	por knaboj	dum 3—4 jaroj	17, 18—21 jaruloj
A. Prepara Lernejo por Universitato			
B. Akademio			
Kolegio	por knabinoj	dum 2—5 jaroj	16, 17—22 jarulinoj
A. Kursoj por elfinintinoj de knabina liceo		dum 2—3 jaroj	
B. Akademio		dum 3—5 jaroj	
Universitato	por viroj	dum 3—4 jaroj	20, 21—24 jaruloj

Edukado en elementa lernejo

En 1925, la tuta loĝantaro	80 000 000	
Nombroj de lernejoj	25 567	
Nombro de infanoj	9 008 039	(? *Red.*)
Nombro de knabinoj	437 456	(? *Red.*)
Procento de lernantoj	99,17	

En 1924, urboj, urbetoj kaj vilaĝoj (elspezis) 49,8% el sia tuta spezo por elementa-lerneja edukado, kaj la celo de deviga edukado estas sufiĉe bone atingita. Plue, ekzistas opinio plilongigi la ĝis 8 jaroj nunan 6 jaran devigan edukadon. En tiu ĉi deviga edukado, la ĉefa celo estas fari naciulojn el ĉiuj lernantoj. Por knabinoj la lernadprogramo diferencas, kiam ili fariĝas 10 jaraj, nome en la 4-a jara klaso ili komencas lerni kudri; jen lecionhoroj por kudrado:

Grado de kursoj	Aĝo de knabino	Daŭro de kudrado en ĉiu semajno
La 4a jara klaso	10 jarulinoj	2 horoj
La 5a jara klaso	11 jaraj	2 horoj
La 6a jara klaso	12 jaraj	2 horoj

Dum tri jaroj ili pasigas 240 horojn por kudrlecionoj.

Eljapanigis *M. S.* (SAT-anino).

(Daŭrigota)

EL SIBIRIO

1. Inter Novosibirsk (ĉefurbo de Sibirio ĉe rivero Obj[1]) kaj Taŝkent (ĉefurbo de Meza Azio) estas projektata nova fervojo, kiu devas havi tre grandan ekonomian signifon ĉar ligos riĉegajn grandegajn regionojn. La regionoj bezonas interŝanĝon de krudaĵoj por disvolvi sian industrion — Sibirio bezonas kotonon kaj fruktojn el Turkestano kaj la lasta bezonas lignon, feron, tritikon el Sibirio. La vojo iros de urbo Semipalatinsk (ĉe r. Irtyŝ) preter lago Balkaŝ al Taŝkent. Kiel sekvo prezoj de ligno en Turkestano malaltiĝos je 30—40% kaj prezoj de tritiko je 12—15% kaj tial kulturo de kotono vastiĝos anstataŭ kulturo de tritiko, kiu nun malutile okupas laborforton kaj plugareon.

2. Klimato de Sibirio ne estas tiom malvarma kiel pensas multaj. En ekstrem-orienta ĉemara parto de Sibirio estas kulturata rizo kaj depost la jaro 1925 — morusarbo, kies unu hektaro dum unu jaro donas ĉirkaŭ 1000 rublojn da profito (1 am. dolaro = 1,94 rublo).

Por la jaro 1927 oni statistikas tie ĉi ĉirkaŭe 1200 hektarojn da silkplantejoj kaj ĉirkaŭ 8000 kilogramojn da produktita silko. Oni konstruas silkfadenan fabrikon. La silkovaro estas liverata de Japanio. La orienta Sibirio (inter lago Bajkal kaj Pacoceano) egalas okonon da tuta areo de USSR, sed havas nur 1 700 000 loĝantojn. Dum proksimaj 10 jaroj oni planas sendi ĉi-tien ĉirkaŭe unu milionon da novaj koloniistoj precipe el Ukrainio trologata.

3. Ĉe Vladivostok en golfo de Petro la Granda oni kaptas trepangojn (vermosimila marbesto, speco de Holoturioj), kiujn manĝas japanoj kaj ĉinoj. Trepangoj estas propraj al sudaj Filipinaj kaj Molukaj insuloj, el kie ili estas eksportataj en granda kvanto kiel nutraĵo por Japanio kaj Ĉinio. En Vladivostok nun estas preparataj ĉirkaŭe 50 000 kilogramoj da sekigitaj trepangoj por eksporti Ĉinion kaj Japanion per regna komercoficejo (privataj entreprenoj en Sovetio ne rajtas komerci kun eksterlando).

4. Duoninsulo Kamĉatko preskaŭ senhoma (nun ĝi havas nur proksimume 15 000 loĝantojn) estas unu el la plej riĉaj fiŝejoj de USSR. Ĝi havas precipe salmajn specojn de fiŝoj facile konserveblajn. La specoj havas tre delikatan kaj bongustan viandon. Dum la jaro 1925 rusaj kaj japanaj fiŝkaptistoj kune liveris ĉirkaŭe 40 000 000 da fiŝoj, sume por 32 000 000 da rubloj. — Riĉega kaj vastega estas Sibirio kaj nur Socialismo sukcesos ĝin dece ekspluati por bono reciproka de tuta homaro, ne sole de sovetianoj! *Maksim Krjukov.*

[1]) Novosibirsk rapide kreskas, ĉiujare je 15%, duoble pli ol Moskvo. Nun la urbo (fondita nur en la jaro 1893) jam havas 110 000 loĝantojn.

DEKRETOJ PRI FAMILIA VIVMANIERO EN TURKMENIO

Kun penetro de sovetaj principoj pri egaleco de virinoj en turkmenian vilaĝon, ĉe la turkmenino elkreskis granda aspiro al eksedziniĝo. La plej gravaj kaŭzoj de tio kuŝas en la malfacilaj kondiĉoj de familia vivmaniero, despotismo de viroj, edziniĝo de fraŭlinoj kontraŭ ilia volo. Aliflanke la turkmenino eksedziniĝas pro malriĉeco de sia edzo kaj espero pri pli bonaj perspektivoj de persona vivo — kvankam en rolo de dua, tria, eĉ kvara edzino de ia riĉulo.

Ĉar inter la turkmenoj ekzistas "kalym" (vendo-aĉeto de l' virino); gepatroj de la turkmenino, celante ricevi ĝin, vendas sian filinon multfoje per instigo al eksedziniĝo kaj novaj edziniĝoj. En kelkaj distriktoj tiaj revendadoj de virinoj ricevis karakteron de profesio.

Plej ofte eksedziniĝo ne finiĝas paceme. Ofendita edzo venĝas al la edzino aŭ al ŝia nova edzo. En la venĝon ankaŭ partoprenas la parencoj. Gento iras kun ponardo kontraŭ alia gento. Iufoje, ne trovante subtenon ĉe lokaj sovetaj organoj, la ofendita flanko organizas bandon, foriras en la sablarojn kaj de tie efektivigas sisteman bataladon kontraŭ la malamikoj.

Ĉi tio iĝas iom komprenebla, se oni atentas post kia streĉo de fortoj kaj energio edziĝas la turkmeno. Por ŝpari monon kaj aĉeti edzinon, malriĉulo devas labori dum 10—20 jaroj kiel dungito de riĉulo. Nature, post la foriro de la edzino, la pagita "kalym" (kameloj, ŝafoj, teo, silkoj ktp.), valoranta ĉirkaŭ 2 000 rubl. perdiĝas por la vilaĝano kaj li ree devas komenci laboregi, ĉar alimaniere li ne povas akiri alian edzinon. Tiele la libera eksedziniĝo plej dolorige trafas la malriĉularon.

Por defendo de la interesoj de la malriĉuloj kaj sub insistaj postuloj de la vilaĝanoj, la Turkmenia Plenumkomitato estis devigata iom limigi la facilecon de eksedziniĝo inter la turkmena loĝantaro kaj eldonis specialan dekreton.

Krom tio estis eldonata dekreto pri multedzeco, "kalym" kaj edzeca aĝo. Multedzeco estas malpermesita kaj persekutata kiel krimo. "Kalym"-on oni rekonis kiel nelaŭleĝan kontrakton, kies plenumo ne estas deviga; paginto de "kalym" povas ĝin repostuli en juĝejo. La fakton de ricevo aŭ pago de "kalym" oni ne pripersekutas, ĉar absolute malpermesi ĝin dume ne estas eble; ĝi tutegale ekzistus kaŝite.

La disvastigita inter turkmenoj moro fianĉigi kaj eĉ edzigi infanojn kaj ne ankoraŭ naskiĝintojn, estas malpermesita. La geedza aĝo estas difinita je 16 jaroj por virinoj kaj 18 jaroj por viroj.

(Laŭ "Turkmena Fajrero" kompilis S. Bojev, Ashabad-Poltorack.)

Fermu viajn leterojn per niaj sigelmarkoj.
Prezo: 100 pecoj 1.— mk. g.
Administracio de SAT.

LETERO EL SOVETIO

Laŭ ekzistanta dekreto en Sovetio ĉiu laboristo kaj oficisto rajtas ĉiujaran dusemajnan libertempon kun pago de salajro. Ekzemple, se iu oficisto aŭ laboristo laboris dum monato 15 tagojn kaj ceterajn 15 tagojn libertempis — do oni pagos al li salajron tutmonatan, kvazaŭ li laborus seninterrompe.

Sed faktoj parolas la malon kaj precipe rilate al geoficistaro; kiu ne okupas sin per malfacila laboro (kontoristoj, librotenantoj, teknikistoj, inĝenieroj kaj aliaj) tiun favoron ne ĝuas kaj iliajn duse majnajn libertempojn oni ne pripagas.

Tion bone pruvas jenaj ciferoj:

Monatoj	Nombro da tagoj dum monato	Festotagoj en ĉiu monato	Kiom da tagoj fakte laboras geoficistaro monate	Por kiom da tagoj oni pagas salajron	Kiom da tagoj estas tute ne pagataj
I	31	7	24	24	—
II	28	4	24	24	—
III	31	6	25	24	1
IV	30	4	26	24	2
V	31	7	24	24	—
VI	30	6	24	24	—
VII	31	4	26	24	2
VIII	31	5	26	24	2
IX	30	4	26	24	2
X	31	5	26	24	2
XI	30	4	26	24	2
XII	31	5	27	24	3
Resume	365	61	304	288	16

El la tabelo oni vidas, ke geoficistaro dum la jaro laboras 304 tagojn, el kiuj oni pripagas laŭ leĝe nur 288 tagojn kaj por ceteraj 16 labortagoj oni nenion pagas, konsiderante ilin kiel 2-semajnan libertempon, kio pruvas, ke faktoj kontraŭas la dekretojn. *"Sovetiano"*.

*

En Sovetio laŭ dekreto, oni devas pagi por eksterlandaj pasportoj laŭ tri kategorioj:

1. Kiu ricevas ne pli ol 75-rublan salajron, tiu pagas 50 rublojn; 2. Kiu ricevas 75 ĝis 200 rublojn, tiu pagas 100 rublojn; 3. Kiu ricevas pli ol 200 rublojn, tiu pagas 250 rublojn.

★

Vivkondiĉoj de laboristoj en Finnlando

Mi volas sciigi la SAT-anaron pri la viv-kondiĉoj de segej-laboristoj en Finnlando, kondiĉoj kiuj estas plej ĝeneralaj, ĉar la segej-laboristoj konsistigas preskaŭ la tuton el la industria Laboristaro ĉi-tie.

Laboro estas preskaŭ ĉiam pagita popece; do, kiu laboras pli multe, ricevas pli multe da salajro. Tre simple, sed fakto estas tia, ke laboro ĉiam estas ĉe la plej pena punkto kaj salajro je la plej malalta. Laboro en segejoj estas aranĝita, oni povus diri, "Taylor-e", ĉar ĉiu laboristo bezonas fari nur unuforman movon per mano aŭ piedo.

Kiel mezan salajron pohoran oni povas konsideri 5 mk-ojn por viro kaj 3 por virino laŭ popeca laboro. Laŭ pohora laboro ĝi estas nur 3,75 ĝis 7,25 por viro kaj 2 ĝis 2,50 por virinoj. Ĉi sube mi notas kelkajn erojn da tempo dum kiuj viro bezonas labori por 5-mk-a horsalajro, por akiri la sekvantajn vivbezonaĵojn:

		ĉirkaŭe		
1 kg da sekala faruno	—	horo	36	min.
1 „ da tritika faruno	1	„	20	„
1 „ da malmola pano	1	„	—	„
1 „ da margarino	4	„	—	„
1 „ da butero	5	„	30	„
1 „ da kafo, plej bona kvalito	8	„	—	„
1 „ da lardo	4	„	—	„
1 „ da porkviando	3	„	25	„
1 „ da bovoviando	1	„	35	„
5 litr. terpomoj	—	„	35	„
1 „ lakto	—	„	30	„
1 jara abono al "S-ulo"	12	„	—	„
1 jara abono al "S. R."	5	„	—	„

Por 1-monata luo de ĉambro, oni devas labori ĉirkaŭ 20 horojn. Tamen ofte segej-laboristoj ricevas loĝejon, hejtlignon kaj lumon senpage aŭ almenaŭ je malalta prezo. Sed okaze, ke ne estas sufiĉe da loĝejoj por ĉiuj laboristoj pere de la firmo, preskaŭ neniam tio estas rekompencita.

Ekzistas en la lando asekuro pro akcidentoj kaj profesiaj malsanoj, tiel en industrio kiel por kamparlaboristoj, sed la leĝo ankoraŭ ne plene respondas sian devon, kvankam ĝi entenas bonan bazon por konstruo de vera labor-asekuro.

Por krom-laborhoroj estas pagite: por la du unuaj 50%, por sekvantaj 100%; dimanĉe por ĉiuj 100%. Domaĝe laboristoj multfoje mem rompas la 8-horan tagon kaj laboras pliajn horojn sen ia rekompenco. *Vojaĝemulo.*

★

NOTOJ EL BRITIO

Dum la lasta jaro, la elcento da naskiĝoj estis la plej malalta depost 1918; samtempe, la elcento da mortoj estis la plej malalta, kiun oni iam konis. Sendube, la malalta naskiĝelcento estis ĉefe kaŭzata de la ekonomia mizero, kiu ankoraŭ regas tie ĉi. Tamen, samtempe, ĝi montras, kiom la naskiĝevitigo disvastiĝis inter la popolo. Estas fakto, ke nur la plej malkleraj personoj kaj la mense malfortaj naskadas idojn senpripense; la inteligentaj laboristoj naskas infanojn, nur kiam ili konsideras, ke la ido havas la ŝancon eviti malsanon, malsaton kaj malscion. Nature, la plej multaj esceptoj al ĉi regulo troviĝas inter la katolikoj.

*

Laŭ lastatempaj artikoloj en diversaj gazetoj regas granda maltrankvileco inter la religiuloj pro "mondskala konspiro forviŝi la religion el la mondo". Unu semajna gazeto enhavas artikolon en kiu la verkinto plendas, ke la ĉinoj ne amas la kristanajn misiistojn; ke la komunistoj en Rusio volas disvastigi la "venenajn instruojn de ateismo"; ke Meksikio rapidege aliras moralan kaoson pro la batalo kontraŭ la pastroj, dum Portugalio estas ŝajne senespere perdita. Hodiaŭ, dimanĉa ĵurnalo enhavas similan artikolon. En ĝi oni precipe kulpigas la komunistojn, kiuj en Britio instruas al la infanoj tian "malpuregan blasfemon", kia estas la aserto, ke "Dio estas tiu potenco kiun la homo, pro malscio, nomis super-

natura". Tamen, sendube por konsoli la fideluloj, iu pastro ĉertigas en la ĵurnalo, ke "estas nenio timenda; neniam oni sukcesos detrui la kristanismon". Do, nun ni scias. En ambaŭ artikoloj oni ripetadas la mizeran mensogon, ke sen religio estus nenia moraleco. Tio trompos neniun, kiu havas eĉ la plej malmultan scion pri la hontinda malvirto kaj morala malpureco de la epokoj de sendemanda fido.

— *6259.*



PASTROJ DECIDIS ELLERNI LA VERKOJN DE MARX



Vana penado haltigi la tempkuron.

Preskaŭ samtempe en urbo Tula, okazis du konferencoj: gubernia konferenco de ĉeloj de "Sendiuloj" kaj gubernia konferenco de la pastraro. Ambaŭ kunvenegoj resumis siajn fortojn kaj tiujn de la kontraŭularo. La "Societo de Sendiuloj" havas en urbo Tula kaj en la gubernio 40 ĉelojn, kiuj kunigas 800 membrojn, el ili 26% virinojn. La eklezian tendaron gvidas 2 metropolito, 2 episkopoj, 3 rabenoj, 2 katolikaj pastroj, 786 "ortodoksaj" popoj kaj 151 diakonoj. Krom tio, la diservutuloj havas je sia dispono 763 eklezidomojn. Malgraŭ tia "interrilato de fortoj", laŭ konfeso de la popa konferenco, la kontraŭreligia movado en Tula kaj gubernio kreskegas. Konsiderante tion, la konferenco decidis akcepti kelkajn urĝajn "kontraŭrimedojn" — ekzemple, "plifirmigi" la disciplinecon de l'pastroj kaj *devigi ĉiujn el ili studadi la verkojn de Karl Marx,* ĉar multiuj devas partoprenadi disputojn kaj, pro nesufiĉa antaŭpreparado, malsukcesas. En kelkaj katedroj de Tula, la popoj legas kontraŭreligiajn rubrikojn de l'tula ĵurnalo "komunisto" kaj siasence ilin "klarigas".

Laŭ "Pravda" tradukis 5305

La miráklo en Konnersreuth

En Konnersreuth (Germanio), malgranda vilaĝo en bavaria regiono "Oberpfalz" kaj trans tiu vilaĝo oni multe rakontas pri la dieca miraklo de Konnersreuth. Tie loĝas knabino travivante ĉiuvendrede la suferadon de Jesuo sub la kruco; sur la manoj kaj piedoj ŝi havas cikatrojn kaj el ŝiaj okuloj kaj el korvundo freŝa la sango gutetas. —

Teresia Heŭmann nomiĝas ĉi tiu "Agnus Dei" (dia ŝafido). Supre sur la ŝtuparo staras la loka pastro kaj per flustra voĉo li reguligas la alfluon de la vizitantoj. Ĉar la alfluo estas tre granda, plue nur estas enlasataj pastroj kaj kuracistoj. En vilaĝane aranĝita ĉambro sur simpla lito kuŝas la 28-jara Teresia. Tri altrangaj pastraj moŝtoj sidas apud la lito de la knabino; multaj virinoj ploras kaj preĝas. La manoj de la knabino estas bandaĝitaj per delikata muslina ŝtofo. Unuavide estas konstateble, ke la knabino troviĝas en stato de dolorega ekstazo. En tia stato ŝi impresas kiel homo lukteganta kontraŭ la morto en terura agonio. El ambaŭ okuloj videbliĝas strietoj da sekiĝinta sango ĝis la kolo. En la kor-regiono la ĉemizo montras sangan makulon, kiu ŝajnas akvoziĝinta. La manoj kaj piedoj bone flegitaj montras sur siaj dorsoj po unu ducentimetran makulon, kovrita per malfreŝiĝinta sanga krusto. La man-internoj kaj la plandoj estas senŝanĝaj. Per la patrino ĵeno estas sciiĝebla:

La patro estas tajloro, posedas bieneton kaj havaĵon kaj vivas simple. La gepatroj havis dek infanojn. Teresia estas unu el la mezaĝaj. Nune ŝi estas 28-jara, neniam ŝi forlasis la vilaĝon, neniam ŝi vidis fervojon. En la lernejo ŝi sukcese lernis. Post ŝia konfirmiĝo, ŝi dungiĝis kiel servistino kaj okaze de incendio pro subita ekteruriĝo ŝi blindiĝis kaj lamiĝis je ambaŭ kruroj. Kvar jaroj pasis tiamaniere kaj post dumnokta sonĝo ŝi denove kapablis vidi kaj iri. Nune, depost la karnavala tempo de 1926-a jaro, ĉiuvendrede la cikatraj okazaĵoj ripetiĝas. Dum la semajno de la sankta vendredo unuafoje la manoj kaj piedoj eksangis. Depost "ĉieliro krista" la sangado ĉesis. Permesita estas al neniu vizitanto, esplori aŭ iel demandi la knabinon. La "spiritus rektor" (instiganto) de la tuta afero estas la sinjoro — pastro. Nenio okazas sen li, ĉio okazas per li. La gepatroj ne akceptas monon aŭ aliajn donacojn. Ĉiutage Teresia ricevas abundon da leteroj, se enestas mono, ŝi liveras ĝin al la eklezio — verŝajne laŭ la bona konsilo de sia mentoro (gvidanto). Universitata profesoro doktoro Nägele el Praha skribis en gazeto, ke li ankaŭ estas vizitinta Teresia Heŭman'on. Ke ŝi estas pia kaj senmakula, ke ĉiuvendrede ŝi enprofundiĝas tiom forte en la suferula dolora vojo de Jesuo, ke ŝi spirite kaj korpe travivas ĝin. La cikatrigo de Teresia Heŭmann ne estas trompo sed nediskutebla fakto.

De teologoj sendube oni ne povas atendi alian opinion[1]). Sed se la gepatroj de ĉi tiu treege histeria Teresia estus vokinta kuraciston anstataŭ pastraĉon, hodiaŭ la malsanulino eble jam estus resaniĝinta; kontraŭe al tio la hierarkio igas kadukiĝi junan vivon nur pro sia reklamo.

El "Freidenker" (liberpensulo), n-o 1, 1927, de P. Falte. Elgermanigis: *Milok Centdek.*

[1]) Ateisto same povus atesti pri la realeco de la fakto. La demando estas: ĉu la cikatrojn kaŭzas dia partopreno aŭ simple memsugesto? — *Red.*



Kiel la laborularo en Jugoslavio eniras la jaron 1927

Militist-faŝista diktatoreco

Antaŭ la fino de la pasinta jaro, iu burĝa humorista ĵurnalo alportis ĉi bildon: kadukulo lulas malsanan infaneton, sur kiu estas skribita la jena vorto: "Registaro". Malantaŭe estas dika bovino. La infaneto estas prezentata al militisto per jenaj vortoj: "Jen al ci ĉi infaneton; refortigu ĝin per bastono, ĉar mi ne sukcesis per lakto kaj flego!"

Tute kontraŭleĝe iu generalo fariĝis ministro por transporto, kio signifas — samkiel en la jaro 1920 — atakon kontraŭ la fervojistoj kaj poste kontraŭ la tuta laborista klaso. Alproksimiĝas senkaŝa militist-faŝista diktatoreco, simila al tiuj en Italio, Hispanio kaj Hungario.

La unuan tagon de ĉi jaro, kroata vilaĝano venĝis la fimortigon al sia filo, ponardmortigante estron faŝistan; sed per tiaj individuaj agoj oni ne povas kontraŭstari atakon de unuiĝintaj burĝoj...

Socia politiko

Alia burĝa ĵurnalo gratulis pri la nova jaro la Laboristaron per ĉi anonco de l'ministro por socia politiko: Nekvalifikitaj laboristoj ne serĉu plu laboron en la grandaj urboj, ĉar tie ĝin trovas nur kvalifikitaj. Anstataŭ helpi al senlaboruloj, oni forpelis ilin el la urboj, ĉar alvenas malsata vintro por pli ol 100000 kaj ili povus ion malagrablan okazigi. Samtempe per ĉi rimedo, la burĝaro malebligas la organizigon de la senlaboruloj, kiuj vagante tra per neĝo kovritaj vilaĝoj, estos finfine enkarcerigitaj kaj senditaj al perfortaj ŝtatlaborejoj. Tiamaniere la ŝtato ŝparas monon por konstrui karcerojn, vojojn ktp.

La ekonomia stato

Prezoj de vivbezonaĵoj altiĝas, ekz. 1 kg. da terpomoj dum la lastaj monatoj plikariĝis de 1 ĝis *2* dinaroj; verdaĵo de 1—*2* ĝis 4—5; lakto de *2* ĝis 4; graso de *21* ĝis *25*. Same plikariĝas karbo kaj ligno pro la britia striko, ĉar Italio aĉetas pli grandajn kvantojn. De faruno (1 kg. kostas nun 5.50 din.) oni intencas altigi la prezon per centra trusto.

Aliflanke salajroj plimalaltiĝas kaj laborkondiĉoj plimalboniĝas. Antaŭ la malsukcesa striko de la karbtransportistoj, ili laboris de la 4-a horo matene

ĝis la 9-a vespere por 29 din. kaj masonistoj estas devigitaj akcepti domkonstrulaboron laŭ diktita al ili intertrakto, kiu taksas por 1 m³ da konstruita muro 37 din. (inkluzive malbonan specon de l' materialo kaj transportadon ĝian). Memkompreneble, ke la burĝaro pere de siaj fidelaj agentoj ĉiarimede malebligas unuiĝon de sindikatanoj — la plej urĝa bezono de la Laboristaro.

Prepariĝas milito

La grandserbia diplomataro, kies idolo, S-ro Ninĉiĉ, estis prezidanto dum la lasta konferenco de l' "pacema" Ligo de nacioj, ebligis al Italio transpaŝi sur Balkanion trans la sojlon de la kroata provinco, oferinte al Mussolini la nordan kaj centran partojn de Dalmacio (kaj vendinte al li antaŭe la havenon Fiume), per tio ĉi ruinigante la ekvilibron inter la balkanaj ŝtatoj. La ruza italia diplomatio, eluzinte ĉi naivan cedemon, sufoke ĉirkaŭis Jugoslavion per fera ringo milita kaj politika. La intertrakto de Italio kun Albanio (laŭ kiu ĉi lasta fakte submetiĝis al la unua) vekis la fiaskintan serbian diplomataron, ĉar Italio ekfrapetis militiste rekte ĉe l' pordoj de "suda Serbio" — pli ĝuste Macedonio. Ninĉiĉ konfesis sian fiaskon — (li per bajonetoj helpis renversigi la liberalan reĝimon de Van-Holi en Albanio) kaj forlasis la postenon. La nova ministro por ekstera politiko, anstataŭ sin apogi sur Sovetion, prefere sin apogas al Anglio, kiu estas devigata subteni Italion en Balkanio, por malebligi iun Franc-Germanian blokon.

Jug. SAT-kor. (6497)



Eltiraĵoj el alia letero el Francia ekspluatejo

(Vidu "Sennaciulon", n-o 118)

"... Mi ĉiutage rehejmiĝas tiel lacega, ke mi ne emas preni la plumon, kiu ŝajnas al mi tiel peza kiel la hakilo, kiun mi la tutan tagon svingas... Alvenas la vespermanĝhoro kaj kiam mi foriĝas de la tablo, preskaŭ mi ne povas rektigi la dorson... Ne estas rimarkinda mia intereso al SAT, ĉar laŭlogike, kiu devas interesiĝi pri tia Asocio se ne la malfeliĉaj kaj suferintaj proletoj? ... Ĉi tie, kie la kapitalista ekspluatado atingis sian plej altan gradon de krueleco, oni bone komprenas la necesecon de organizo kiel SAT...

...La plejmulto el la laboristoj ĉi tie estas eksterlandanoj, nome: rusoj, poloj, germanoj, ĉekoslovakoj, balkananoj, alĝerianoj, italoj, aŭstroj, holandanoj, hispanoj, k. a. Imagu, do, kia babelturo staras. Eĉ unu esperantiston mi ne renkontis. La malmultaj francoj estas fieraj kaj naciemaj. Ili ne toleras, ke ĉe ilia flanko oni parolu alian lingvon ol la francan. Eĉ okazas al brito, kiu ne tre bone scipovas francan lingvon, ke li estas humiligata de la francoj. Ofte okazas malpacoj inter francoj kaj alilanduloj pro vantaj kialoj.

Dum la kristnaskotagoj mi vidis multajn polojn kaj aliujn, kiuj ebriaj eniris en dancejon por ĝeni la gedancantaron... Kelkfoje mi vidis ilin la sekvantan matenon sur la herbo apud la vojo, pro la alkoholo kiu plenigis ilian stomakon.

La unuajn tagojn ĉe la laborejo, la francoj demandis min pri mia nacieco. Ĉar mi konfesis nenian naciecon, estiĝis vera naciema kontraŭnaciema interparolado. Ili ne komprenis kion signifas la vorto sennaciulo, ĉar por ili ĉiuj devas havi naciecon. Ili demandis kian lingvon mi parolas. Sed vane; ili ne scias kaj eĉ ne aŭdis paroli pri esperanto: "En kiu lando oni parolas tiun lingvon?" ili demandis. Kompreneble Esperantio-n ili ne vidis sur ia geografia karto, des malpli Satanio-n! Fiaskinte ili de tiam rigardas min kiel strangulon...

Klasorganizoj ĉi-tie malestas. Nur ekzistas primalsana societo "La Solidarité" (La Solidareco), kiu estas regata de la fabrikestraro.

Ekzistas diversaj loĝejaroj: unu por fraŭloj, alia por edziĝuloj, alia por italoj, hispanoj, germanoj kaj poloj. Ekzistas alia nur por rusoj, kiuj estas proksimume 300. Por ili proksime oni nun konstruas *rusan preĝejeton!* Okaze mi parolis kun kelkaj rusoj kaj neniu el ili parolas bone pri la nuna Rusio... tial ke ili militis en la kontraŭrevoluciaj vicoj.

...Malbonajn ecojn havas la ĉiaspecaj uloj ĉi-tieaj. Ĉe la manĝejo oni ne povas resti longtempe, ĉar la manĝantoj ĝenas la najbaron laŭpove; oni baraktas, kriegas, kraĉadas, maldecaj vortoj ŝprucas el buŝoj... kaj eĉ foje teleron da supo oni disverŝas sur iun. Ŝajnas infera aŭ besta manĝado. Ĉe la loĝejoj okazas preskaŭ la samo. Unu... fermas la pordon bruege, alia disrompas la lignoŝtipojn, ĝenante la dormadon de la aliaj. Se iu senatentas momenton siajn propraĵojn, ĉiam estas iu alia preta ŝteli. Bagatelaĵojn oni ĉiutage ŝtelas, ĉar la ĉambroj estas komunaj. Iu kunulo mia perdis sian tutan monon en kartludado kaj anstataŭ redoni al mi kelkajn frankojn, kiujn li ŝuldis al mi, min ŝtelis mian tutan salajron dumnokte, kiam mi dormis. Mi diris al li: "redonu la monon kaj mi pardonos kaj ne denuncos vin al ĝendarmoj"; sed li ne volis. Poste la ĝendarmoj trovis la monon kaŝitan en unu el liaj ŝtrumpetoj kaj kunportis la friponon al karcero. Li ja estis enkarcerigindа, ĉu ne? Nun mi loĝas kun sviso kiu instruas min pri franca kaj germana lingvoj. Tiu ĉi estas bonulo fidinda.

(6190)

Al ĉiuj Soveti-anoj!

Monon por la Adm. de SAT, ne sendu al Leipzig, sed al nia bankkonto ĉe C. K. de SEU en Moskvo. Niaj bankoj ne akceptas sovetian monon. — *Adm.*

La sekretario de profunuiĝo kiel denuncisto

"La plejega fripono de l' mondo estas la denuncisto." (Heine)

En Hungario ni ja spertis la agadon de denuncistoj el la plej danĝera speco — tiuj, kiuj sin suprenpuŝis en sindikat- kaj politikorganizoj, vivantaj senzorge el la ŝvitlaboro de l' klasbatalantaj laboristoj, kaj poste abomeninde elliveris ilin al la ekzekutistoj de l' kontraŭrevolucio.

Elstaras en ĉi-rolo *Gabrielo Horovitz,* dum 6 jaroj sekretario de la lignaĵistsindikato kaj unu el la gvidantaro de l' hungaria soc.dem.partio.

Per helpo de lia atestado, niaj K-doj estis kondamnataj kaj batigataj ĝissange. Malgraŭ tio, ke la registaro klopodis kaŝi sian fidelan servanton, la kanajlo estas senmaskigita, kune kun siaj amikoj, antaŭ la proceso kontraŭ Rákosi kaj Vági.

Inter liaj denuncoj estas, ke lia atentigo al la juĝistaro pri tio, ke la partio de Vági (maldekstra socialista partio), havas monon kvankam la plej granda parto el la anaro estas senlabora kaj senmona; pri la manko de pasportoj ĉe K-doj kiuj vojaĝis al Wien kaj pri tio ke la partio havis rilatojn kun eksterlandanoj! Ĉilastan informon li ricevis pere de letero adresita al Vági, kiun li "hazarde" malfermis kaj konkludis, kvankam la letero estis tiel redaktita, ke nur la adresito povus kompreni ĝin, ke Vági havas sufiĉe fortan kaj intiman rilaton kun eksterlando!

Pro la agado de ĉi-fiulo, ne nur multaj K-doj niaj estas en malliberejo, sed centoj da klasbatalantoj estas observataj de la policistaro, kelkfoje laŭ tia maniero, ke ili estas fakte malliberaj en siaj propraj vilaĝoj kaj urboj. *Ribelulo.*



Fabrik-laboristoj en Innviertel

Innviertel (Inn-distrikto), la okcidenta parto de Supra Aŭstrio, estas terkultura regiono. Tamen troviĝas tie ankaŭ kelkaj brik-, lin-, bier-, led- kaj sukeraĵfabrikoj. Ne ĉie oni traktas same la laboristojn. Mi volas en mallonga skizo, montri la laborkondiĉojn nur en la ĉirkaŭaĵo de Ried, urbeto kun 7000 loĝantoj, politika kaj komerca centro de Innviertel.

La fabrikposedantoj estas ĝenerale "ariaj" (t. e. indo-eŭropaj — pur-rasaj), germannaciuloj, kiuj en sia naciisma frenezeco, kaŭzita de ĉampan-trinkado, rigardas laboristojn kvazaŭ senrajtajn netaŭgulojn.

La fabrikoj funkcias regule nur kelkajn tagojn en semajno (eĉ tre ofte nur sabate posttagmeze!). La salajro de la gelaboristoj estas kalkulata laŭhore, po 45 groŝoj; do, semajne oni gajnas ne pli ol 5 ĝis 6 ŝilingojn. Ĉefoj kaj ceteraj kancelarimoŝtoj (librotenistoj k. c.) ricevas ne malpli ol 66 ĝis 70 ŝilingojn semajne, ĉar ili estas burĝoj kaj rajtas je tio, eĉ nenion farinte, — sed junulino, kies patrino troviĝis en malriĉulejo, malsaniĝis kaj sekve estis maldungata. Plue, oni traserĉas la gelaboristojn, por ke ili ŝtelu nenion, sed la moŝtuloj forportas kion ili volas sen ia danĝero pri alserĉado.

Pri higieno kaj pureco estas nenia zorgo en la fabrikoj de la Inn-distrikto. Ekz. en akvujo lavas la fabrik-personaro siajn malpurajn piedojn aŭ eĉ pantalonojn kaj en la sama akvo poste estas lavataj la sukeraĵujoj; kaj post tiu manipulo oni plenigas la ujojn kaj ilin ekspedas al la nesuspektantaj aĉetantoj.

Dum la libertempo (t. e. post la 8-a aŭ 10-a horo da laboro) devas porti la gelaboristoj, ankaŭ la gekontoristoj, pezajn sakojn kaj aliajn pakaĵojn en la trikilometre malproksiman urbon.

Andorfer (8197)

★

Potemkin en Nederlando

Ankaŭ en Nederlando oni montris la faman filmon "Potemkin". Sed ne ĉie! Kelkloke la urbestro malpermesis la montradon. Aliloke oni devis ion ellasi el ĝi.

En Amersfoort, garnizonurbo, kie estas multaj soldatoj oni ankaŭ malpermesis ĝin. Pro tio fondiĝis unuiĝo por montri la filmon en nepublika kunveno. Ĉi tiu unuiĝo akiris tiom da membroj, ke la montrado de la filmo devis okazi dum 7 sinsekvaj vesperoj. En Vlissingen, kie oni volis fari la samon, la polico tuj konfiskis la filmon.

Ankaŭ en la t. n. "malluma Sudo" (t. e. la katolikaj sudaj provincoj) oni montris la filmon, sed sufiĉe kripligitan. Jen kiel ĝi estis montrita en Maastricht, la ĉefurbo de la provinco Limburg.

Ĉe la komenco aperas la sciigo, ke la montrotaj situacioj en Rusio estis eblaj, sed ke oni en Nederlando, dank' al la saĝa kaj bonega regado, evitis ilin.

Ĉe la epizodo, en kiu la kozakoj mortpafas la loĝantojn de Odessa, aperas la sciigo. "Jen la teruraĵoj de la revolucio. La senkulpuloj falas, la kulpuloj restas ekster danĝero."

En la originala formo la filmo finiĝas tiel, ke la ŝipanaro de la elsenditaj ŝipoj rifuzas pafi al Potemkin. En Maastricht oni tute forlasis tion. Anstataŭe aperas la sciigo, ke la cara registaro estis doninta la saĝan ordonon ne pafi. Kaj per tio la filmo finiĝas kaj la muziko ludas la "Wilhelmus" (malnovan nacian kanton)!

La "Ligo kontraŭ la revolucio" jam petskribis al la ministro ke li malpermesu la montradon de tiel malbonaj filmoj kiel Potemkin. *(670)*

★

Banejoj en Finnlando

En la finnaj vilaĝoj troviĝas tiom da banejoj, kiom estas da domoj aŭ dometoj. Se iu koloniisto iras arbaron por konstrui al si dometon, li unue konstruas banejon kaj en ĝi loĝas, ĝis lia loĝĉambro estas preta.

La plej primitiva banejo estas malgranda ĉambro, kelkfoje kun ia antaŭĉambro por el- kaj envestiĝo. La banejoj tre varias laŭ grandeco, sed plej ofte ili estas tiom malgrandaj, ke nur du aŭ tri personoj samtempe povas sin bani. La internaĵo konsistas el tabularo ĉe muro ĉirkaŭ unumetro alta, ŝtona fajrujo konstruita kiel kuboforma amaso el tuberaj ŝtonoj sur kiu estas bol-poto por varmigo de akvo; ankaŭ ekzistas ligna sitelego por malvarma akvo kaj unu aŭ du lignaj benkoj. La konstruo havas nenian fumtubon krom trueto en la muro aŭ plafono; pro tio la banejo estas interne tre nigra pro fulgo — eĉ la unu sola malgranda fenestro estas preskaŭ netravidebla.

Ĉar oni hejtigas la fajrujon kelkajn horojn, la ŝtonoj estas varmegaj kaj la akvo en la bol-poto bolas eĉ kiam la lastaj ligneroj estas finbrulitaj kaj kiam la karbaĵo ne plu multe ardas, tiam estas la banejo preta por banantoj.

Nun eniras la banantoj, ambaŭ seksoj kune; ĉiu havas ĉemane banvergaĵon faritan el foliaj branĉoj de betulo. Komencas la banado per la suriro la tabularon de ĉiuj, unu ĵetante akvon sur la ŝtonojn de l' fajrujo, kiam la akvo subite transformiĝas en vaporon kaj leviĝas supren ĉirkaŭante la banantojn. Ili nun sin ĉirkaŭ vipas per la vergaĵo, kiu kaŭzas plian varmegon al la haŭto, kiu treege ŝvitas. Ju pli da akvo estas ĵetata sur la ŝtonaron, des pli intensa iĝas la varmo kaj malforthaŭtuloj devas malsupreniri aŭ eĉ kuri eksteren.

Post la vaporigo la banantoj malsupreniras kaj, sidante sur benko, sin lavas per sapo kaj varma akvo. Kelkaj lasas sin sekiĝi, aliaj sin sekigas per tolaĵo.

Tiu ĉi procedo okazas ĉiusemajne kaj dum somero pli ofte; ĉiu finno konsideras la banadon kiel unu el la plej urĝaj bezonoj por la korpo.

Vojaĝemulo.

★

Malutilo de esperanta stelo!..

Nuntempe dum la klerikala reĝimo en Ĉeĥoslovakio estas ĉio okazebla; oni do ne miru, ke povis esti la sekvanta okazintaĵo.

Sendis unu germana instruisto petskribon, postulanta vakantan postenon de lernej-inspektoro ie en germana teritorio. La peto trairis ĉiujn koncernajn instancojn kaj finfine ĝi estis donata por decido al germanaj ministroj, kiuj estas iaj konfidatoj de l' germana enloĝantaro (nature la burĝa parto, ĉar la Laboristaro ne influas). Al la petskribo kaj dokumentoj almetis la instruisto foton el pli fruaj tagoj kiam li estis ankoraŭ funkciulo de esperantista societo, kaj insigno kvinpinta stelo, okulfrape brilis sur lia surtuto. Ĉi insigno fariĝis al la kandidato fatala.

La petskribon, dokumentojn kaj foton ricevis iu pia ministro, kies okuloj plaĉe rigardis la belan fizionomion de la sendinto ĝis li rimarkis la stelon. Kun ŝanĝinta mieno li elvokis: "Ha, granda malbono estus sur la tero kaj en la ĉielo dum la hodiaŭa klerikala reĝimo, se akirus la postenon de lerneja inspektoro, komunisto! Tiu ĉi homo estas ja komunisto, ĉar li portas sur lia vesto kvinpintan stelon kaj tial li ne povas ricevi la oficon."

Tiam la petskribo remigris el la kabineto de l' pia ministro en la kancelarion de iu burokrato kun rifuza decido. Komprenеble, ke la maljuna instruisto ne ricevis la postenon, sed iu junulo kiu versimile estas subtenanto de la klerikala reĝimo ĉeĥoslovakia. *F.*

Provizo de SAT-poŝtkartoj
kun la kongres-marko estas elĉerpita.

☆ DISKUTEJO ☆

Cu Marks eraris?

"La antiidealisma sofismo de K. Marks"

(Daŭrigo[1])

Do la ideoj elportas la premon de la ekonomiaj kondiĉoj. Kaj tiu premo estas ordinare tia ke oni povas diri, ke, entute, la kolektiva vivo dependas de ĝi. Ĝi dependas de la ekonomiaj kondiĉoj, sed ĉi ne elfluas el ili kiel el sia fonto. Ĉi-tiu restas, malgraŭ la diro de Engels, "en la kapo de l' homoj". Kaj ni povas vidi sur ĉiuj kampoj de l' vivo, ke la relativa sendependeco de la ideoj, rilate al la ekonomiaj kondiĉoj, montras siajn efikojn.

En la politika vivo, unue, ĉu ni ne vidas ofte, dum la marŝado de l' historio, la senbridan agitadon de la partioj kaj eĉ ŝtatrenversojn, malgraŭ tio, ke la ekonomia reĝimo estas tute solida? Kaj ĉu iam troviĝos konscienca historiisto, kiu provos alligi ĉiun ajn politikan okazintaĵon en la vivo de iu nacio al iu ekonomia kaŭzo, kies fatala sekvo ĝi estus?

Kial? Tial ke la homoj kaj la partioj luktas ne nur pro ekonomiaj motivoj, sed ankaŭ pro sentimentaj kaj intelektaj kaŭzoj en kiuj forestas materia intereso. Kiam Marks kaj Engels, ekzemple, asertas, en la *Komunista Manifesto,* ke la "konsciencliberecо", ĉe sia veno sur la politikan scenon de l' mondo, "esprimis nur la regadon de l' libera konkurenco sur la kampo de l' socio", ili forgesas, ke, kiaj ajn estas, sociologie, la rilatoj, kiuj ligas konstitucie ambaŭ fenomenojn kaj igas ilin solidaraj, estas tamen vero, ke nenio permesas dependigi unu de la alia, kaj nenio permesas supozi *inter ili* iun kaŭzecan rilaton, anstataŭ konsideri, ke ili havas komunan kaŭzon. Kaj, fakte, ĉu ne estas ĝuste tiu "ideologio", tiom malŝatata de la historia materialismo, kiu montriĝas, ĉe analizo, kiel la komuna kaŭzo de tiuj du grandaj historiaj okazintaĵoj, samtempaj, sed sendependaj unu de la alia, tiel sendependaj *unu de l' alia* kiel estas du folioj de sama arbo, kiel du trunkidoj de sama trunkobazo? Fakte ankaŭ, tia reciproka sendependeco, ekzistanta inter la politika fakto kaj la ekonomia fakto, estas tiel evidenta, tiel reala, oni vidas multajn homojn kaj arojn da homoj, kiuj, sen ia nekonsekvenco, estas

---

[1]) Vidu la n-ojn 123—124, 125—126 de "S-ulo".

Sub signo de Gaja Muzo!

★

Verdkata Testamento

de

RAYMOND SCHWARTZ

Afr. 2.— mk. g.

ĉe la ADMINISTRACIO DE SAT.

influataj de la unua kaŭzo kaj rezignas la alian, firme subtenas la konscienc-liberecon, dum ili senĉese kontraŭbatalas la ekonomian individuismon? Fakte ankaŭ, ĉu fine tio ne estas klara, ke, se la kolektiva psikologio, kiun montras tiuj ideoj kaj faktoj, sendube rezultas, iuparte de ekonomiaj interesoj, ĝi certe rezultas aliparte de intelektaj kaj moralaj fortoj, kiuj absolute staras ekster la demandoj pri produktado kaj interŝanĝado? Neniu saĝa homo pretendos, ke ĉiuj "liberaluloj", ĉiuj liberecanoj akiris siajn opiniojn nur pro la influo de materiaj interesoj; neniu asertos, ke ne ekzistas inter ili — kaj grandnombre — homoj, kies sintenado estas diktata de la idealo mem, de altaj ideoj, de filozofiaj kaj moralaj konsideroj, kaj kiuj tute ne estas influataj de ekonomiaj kaŭzoj.

"Se negroj aŭ ĉinaj kulioj, diras Menger[1]), laborus en germanaj fabrikoj, neniam iu socialisma demokratio naskiĝus, *eĉ supozante la ekziston de ĉiuj necesaj ekonomiaj kondiĉoj.*" Kion signifas tio? — Nenion krom tio, ke la ekonomiismo estas simplisma determinismo, ke la ekonomiaj cirkonstancoj *preparas* ofte politikan fenomenon, sed ne efikas, ke ĝi *nepre devas okazi,* ĉar ili ne *produktas ĝin,* kaj ne ili, sed la spiritostato, la psikologia stato de la agantoj, estas, finanalize, la efika forto.

*

Same la ekonomiaj cirkonstancoj ne sufiĉas por klarigi la ekziston de la diversaj filozofioj, moraloj kaj religioj.

La religioj, infanecaj filozofioj, tute ne estas, kiel asertas la marksanoj, nura "rebrilo" de la ekonomia situacio; ili ne estas nur ia trompa konsolo, ia "nubo", kiu kaŝas la realon de la materia vivo. La religia sento estas certe alia afero, ol la "ekonomia bezono aliigita" kaj serĉanta en ia imaga transmondo kontentigojn, kiuj mankas al ĝi sur la tero. Tio estas tre nesufiĉa kaj naiva, tre simplisma komprenmaniero pri la deveno kaj karaktero de la religioj. Ili ja estas, reale, klarigoprovoj pri la universo kaj ĝiaj fenomenoj, anticipaj klarigoj pri kosmologio, rezultoj, aperigoj de la komprenbezono, de la sinteza intelekta bezono, de la filozofia bezono, kiu karakterizas la homon kaj levas lin super liajn bestajn praavojn. Kaj voli, ke ilia "ideologio" estu nur sekvo de la materia vivo, estas paradoksege paroli: tio estas vere kripligi la dialektikon kaj la simplan saĝon. Ĉu oni povas prave aserti, ekzemple, ke la predikado de Jesuo aŭ de Budho estis nur la rezulto de teknika revolucio, de "metamorfozo de la produktado kaj interŝanĝado"? Ĉu oni povas prave aserti, ke la katolikaj dogmoj, proklamitaj dum la marŝado de la religia historio de nia eŭropa okcidento, estis nur la fatala produkto kaj la rebrilo de ĝia ekonomia hismarksanaj komentistoj ne sukcesos: ĝi torio? La tuta sofisma subtileco de la ne povos eĉ duonpravigi la jenan absurdaĵon: la perekonomia klarigo pri la religioj kaj filozofioj.

Kaj se la ekonomiaj cirkonstancoj ne sufiĉas por klarigi la filozofiojn kaj religiojn, kiel do ili povus klarigi la jurajn kaj moralajn konceptojn? Ĉi lastaj, kion ajn pri ili oni povas pensi, dependas de la unuaj. Se la filozofioj kaj religioj ne kreas entute la moralajn kaj jurajn konceptojn, ĉi lastaj almenaŭ ĉerpas el ili grandan parton el siaj elementoj, kaj estus malfacile, ekzemple, koncepti dian juron sen religio, samkiel estus malfacile koncepti vere homan moralon, filantropian moralon ekster sinteza koncepto, kiu ĝin pravigas kaj inspiras. Ĉu ne estas tuta filozofio, tuta koncepto pri la universo, samtempe kiel pri la homo, kiu sin montras en tiu malaprobo kontraŭ la absolutismo kaj arbitro, en tiu moralo de homa digno, en kiu oni jam povas ekvidi la estontan gvidvorton.

*

Kaj la ekonomio ne nur klarigas la jurajn kaj moralajn konceptojn nunajn, kiuj tiom dependas de la filozofio, kiuj devenas el ĝi, konscie aŭ nekonscie, sed, male, la juraj kaj moralaj konceptoj liveras la klarigon pri la ekonomia reĝimo, kiun ili regas. *Necesas inversigi la termojn*[1]) *de la ekvacio starigita de Marks.* Nekontraŭdireble, en la homa mondo, la kosmologia koncepto, la jura koncepto, la morala koncepto, kiuj devenas unu de la alia, antaŭiras, rezultigas, regas la ekonomian kaj socian organizon, kies animo ili estas.

Tial estas eraro diri, kun la marksisma interpretado de la Statuto de la I-a Internacio, kiu tiom decide resumas la eraron de Marx kaj lian metafizikan vidpunkton, ke "la ekonomia subeco de la laboristo al la laborilposedantoj estas la *unua kaŭzo* de lia sklaveco en ĉiuj ĝiaj formoj[2])". Tiu "unua kaŭzo" tute ne estas la *unua.* Ĝi devenas el la jura koncepto, el posedanteca koncepto, kaj estas ĉi tiu — estante siavice bazita sur filozofia eraro: la absolutisma iluzio, la iluzio pri estreca kreado — kiu donas al ĝi forton kaj viglecon, kiu donas al ĝi moralan forton sen kiu ĉiu ekonomia reĝimo estas nur korpo sen animo, korpo sen vivo. La vera kaŭzo, ne unua sed *efikanta* kaŭzo, de ĉiu socia sklaveco vivkapabla kuŝas en la *spirito, kiu pravigas ĝin,* en la racio, erarigita, trompita racio, kiu subtenas, ŝirmas ĝin kaj donas al ĝi forton kaj vivon.

Forestas ĉi tie ĉia unua kaŭzo. Same kiel ĝi forestas sur ĉiu ajn kampo. Ni ne bezonas tian vantan metafizikon. Kaj la materialisma superstiĉo de Marx samvaloras en niaj okuloj kiel la kontraŭa superstiĉo, la pura idealismo, kiun akre kontraŭbatalas la marksismo.

Tio estas tute vera: ne povas okazi idealaj realiĝoj (efektiviĝoj) sen favora materiala bazo. Sed *ĉi lasta estas nur la kondiĉo, ĝi ne estas la kaŭzo, la moviga kaŭzo de la ago.* Necesegas ne konfuzi. Kaj tion faras la marksismo: ĝi konfuzas *kondiĉon* kun *kaŭzo.*

La moviga forto de nia agado kuŝas en ni: ĝi kuŝas en la diversaj bezonoj de nia naturo... Kaj ĉi tie oni kontraŭdiras kaj rebatas al ni: "Necesas vivi antaŭ ol filozofadi. *Primum vivere; deinde philosophari.*" — Kompreneble, se filozofadi signifas metafizike argumentadi. Sed tute ne, se tio signifas serĉi tion, kio estas justa. Oni vivas, jes ja, antaŭ ol rezonadi. Sed ĉu la justo, la justo sub siaj multaj aspektoj, ne estas la leĝo mem de la vivo, *la leĝo mem de la forto?* Kaj ĉu la vivulo, kia ajn ĝi estas, eĉ la plej senkonscia, ne obeas tiun leĝon kaj instinkte konas ĝin?

Ĉi instinkto estas la ĝermo de la morala forto; ĝi estas la ĝermo de la homa digno. La sola fakto, ke ĝi ekzistas, faras el la materialisma ekstermoralismo malnormalaĵon kaj sensencaĵon.

El "Esquisse d'une Philosophie de la Dignité Humaine[1])" (1924) de Paul Gille (Pol Ĵil), profesoro ĉe la Belgia Instituto por la Superaj Studoj, tradukis *Iuelie.*

---

[1]) "Etat populaire du travail" pĝ. 219.

[1]) *Term-o.* Ĉiu el la kvantoj de ekvacio. (Laŭ la vortaro de Boirac.) *Trad.*

[2]) Laŭ la marksista teksto de la jaro 1871. En la origina franca teksto la vorto "kaŭzo" estis, tre sagace, anstataŭita per *fonto.*

[1]) Librejo: Félix Alcan, 108, Bould. St. Germain, *Paris* (VIe.)

Artistoj-SAT-anoj!

La Administracio de SAT intencas eldoni artan ilustritan poŝtkarton. Ĝi devas samtempe speguli la ideon de SAT kaj tiun de esperanto (por ambaŭ ideojn propagandi). La preso estos multkolora, sekve ni deziras ankaŭ, ke la modelo estu multkolora. Vian modelon vi sendu ĝis la 1. aprilo 1927 al la Adm. de SAT. Idealistoj-artistoj eklaboru! Sendu multajn projektojn por ke ni elektu la pli taŭgan. *Adm.*

ŜTATO KAJ REVOLUCIO

DE N. LENIN

estas verko, kiun ĉiu revoluciano devas nepre havi en sia biblioteko

—

150 paĝoj, formato 12×18
Prezo: 1 mk. g.

Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT

Colmstr. 1, III, Leipzig O 27

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

VII-a Kongreso de SAT
Lyon (Francio)
12.—16. aŭgusto 1927

2-a Komuniko

Kongresejo. — *La Kongreso okazos en la salonego "Emile Zola" de kooperativo "L'Unitaire", 127, rue Boileau,* Lyon, *VI.*

Kongreskomitato. — *Prezidanto: K-do Marcel Roux, 90, rue Boileau,* Lyon, *VI. (Francio), al kiu oni sendu aliĝilojn, leterojn, monon ktp.*

Kotizo. — *Egala je SAT-kotizo, sed ni akceptos plian monon, kiun bonvolos donaci aliĝintoj por helpi al bona aranĝo de la kongreso.*

Pago. — *Per naciaj biletoj aŭ ĉeko en registrita letero. Francianoj prefere pagu al la kongres-kasisto: K-do Léon Chaussade, 64, rue des Macchabées,* Lyon, *V. (Chèque postal Lyon 7521).*

Aliĝoj. — *Nur estos valoraj la aliĝiloj akompanataj de la mono. La aliĝilon tekstu tre legeble laŭ jena ordo: 1. antaŭnomo, 2. familia nomo, 3. profesio, 4. strato kaj n-o, 5. urbo, 6. lando kaj SAT-sektoro, 7. SAT-matrikulo.*

Eldonaĵoj. — *La Komitato jus eldonis serion da 20 belegaj poŝtkartoj kun esperanta teksto kaj reklamo pri la VII-a kongreso. Prezo afranke: 4 fr. fr. (3 fr. 25 por francianoj).*

1-a Listo de aliĝintoj:

1.	K-do M. Roux, Lyon	132
2.	„ Léon Chaussade, Lyon	4622
3.	„ Louis Gros, Lyon	5057
4.	K-dino A. M. Gérin, St. Philibert d'Albon	3921
5.	„ G. Gérin, Chateauneuf de Galaure	3920
6.	„ Z. Gérin, Serves	5067
7.	„ B. Deygas, Chastel-Arnaud	3918
8.	„ S. Tinland, Chambon de Laviolle	3792
9.	K-do Bernizet, Romans	7996
10.	„ Hosejn Sadykov, Leningrad	6358
11.	K-dino Frida Noël, Paris	1370
12.	K-do B., Paris	11
13.	„ Lanty, Paris	1
14.	„ Glodeau, Paris	50
15.	„ Cachon, Paris	24
16.	„ C. Roux, Paris	835
17.	K-dino V. Feuiller, St. Cierge	375
18.	„ E. K. Limouzin, Paris	509
19.	K-do Baĵenov, Ĉita	1367
20.	„ Bitzer, München	1810
21.	„ Hauber, München	1803
22.	„ Löwe, Leipzig	98
23.	„ Lerchner, Leipzig	90
24.	„ Kolĉinski, Kremenĉug	1447
25.	„ Sannikov, Moskvo	8907
26.	„ Svistunov, Moskvo	8908
27.	„ Svistunov, Moskvo	5582
28.	K-dino Lerchner, Leipzig	2465
29.	„ Lehmann, Leipzig	913
30.	„ Svistunova, Moskvo	9104

Salutvespero. — *Ĝi okazos vendredon, 12-an de aŭgusto. Jam ni petas alvenontojn, lertaj je kantado de esperantaj kantoj, informi nin pri sia akcepto partopreni la festan parton de la salutvespero.*

Propaganda kunvenego. — *Por impone fermi la kongreson, kunvenego estos organizata mardon 16-an de aŭgusto, vespere. Ni deziras, ke alilandaj K-doj paroladu esperante pri batalo de sialanda Laboristaro kaj agado por elsklaviĝo. SAT-anoj-oratoroj skribu pri tio al la Kongreskomitato.*

Prikongresaj anoncoj en gazetoj. — *Ni atentigas ĉiujn SAT-anojn, ke ili devas ĉiel profiti la 40-an datrevenon de esperanto por pliprofundigi nian movadon en laboristajn rondojn. La jaro 1927 devos esti kvazaŭ simbolo de la senĉesa kresko de nia Asocio kaj de l' disvastigo de universala lingvo tra la mondo.*

En viaj organizoj priparolu nian asocion, en laboristaj gazetoj presigu notojn aŭ artikolojn pri nia VII-a. Ni ankaŭ alvokas la SAT-perantojn en ŝtat-ĉefurboj, klopodi ĉe informagentejoj, por ke ĉiuj gazetoj de l' koncerna lando sciigu la okazigon de la VII-a Kongreso de SAT. Jam en Francio, pere de "Havas" kaj "Radio"-agentejoj, preskaŭ ĉiuj jurnaloj informis pri nia jarkunveno. Nur la pli multe legata laborista gazeto francia "L'Humanité", persistas ignori nian movadon. Ĉiuj K-doj nepre konsciu, ke nia kongreso ne bone sukcesus, se nur Lyon'aj laboristoj scius pri ĝi. Bonvolu sendi gazetojn ion presintaj pri la kongreso al K-do Prezidanto.

Komisiite de l' kongres-komitato,
La Prezidanto: M. Roux.

Denove la sovetia poŝtadministracio uzas oficiale esperanton

La ĉi-subaj bildoj parolas sufiĉe elokvente por ne bezoni komentojn. Ni nur aldiru, ke K-do *G. Demidjuk,* kiu sendis ĉi specimenon skribis dorse de la karto: *"... Ĉe ni la movado kreskas spontane. Sufiĉas diri, ke ne ni nun klopadas ĉe diversaj institucioj, sed jam ĉi lastaj petas nin pri starigo de peresperanta korespondado, invitas por raporti pri esperanto ktp ..."*



Jen la rezulto de la peresperanta agado kiun iniciatis kaj subtenas SAT. Ĉu finfine ĉiuj laboristaj esperantistoj ne komprenos, ke ekster niaj vicoj ili ne povas tiom efike servi al la esperanta movado?

Esperantistaj laboristoj el la tutmondo SAT-aniĝu!



NOVAJ FORMOJ DE INTERNACIA INTERLIGO
(Tver-a eksperimento)

Plenara kunsido de C. K. de SEU aprobis la tver-an eksperimenton de internacia interligo en novaj formoj. Ĝis nun esp.-rondetoj havis monopolon de Int-Korespondado. Uzado de esp-o estis ebla nur al personoj lernantaj ĝin. Laŭ la nova sistemo esp-on uzas personoj, kiuj eĉ ne havas esp-rondeton. Uzado de esp-o fariĝas amasa, dank' al organizado de Komisioj por Interligo en ĉiuj lab. organizoj kaj ebligas korespondadon kun eksterlando al la tuta Laboristaro. Laŭ tia sistemo en Tver estas organizitaj:

1. Oficejo por intern. interligo ĉe *Kulturfako de Gubernia Intersindikata Soveto* (GSPS). La oficejo havas reprezentantojn en ĉiuj Gub.-fakoj de Sindikatoj kaj en ĉiu Fabrika kaj Oficeja Komitato. Tiuj lastaj organizas kolektivan korespondadon de laboristoj kaj oficistoj kun eksterlandaj SAT-anoj kaj lab. organizoj (pere de SAT-anoj). La leteroj estas skribitaj ruslingve (se en la fabriko estas neniu esp-isto kaj ne ekzistas esp-rondo) kaj pere de Gub. profesia reprezentanto estas transdonataj al la oficejo por Interligo en GSPS. La oficejo tradukas la leteron esp.en kaj forsendas ĝin eksterlanden. La respondo devas esti sendita laŭ la adreso de GSPS, kie ĝi estas tradukata ruslingven kaj direktata al la adresita oficejo aŭ fabriko.

2. Oficejo por Intern. Interligo ĉe *Fabrikdistrikta Komitato de Komjunula Unuiĝo*

(Adreso: Tver, Fabrajkom VLKSU. Of. por Int. Interligo). Tiu oficejo unuigas intern. korespondadon de komjunulaj ĉeloj en fabrika distrikto. La ĉeloj havas komisiojn por Intern. Interligo, kiuj, simile al prof. reprezentantoj, organizas kolektivan korespondadon de komjunuloj kun junaj SAT-anoj kaj junlaboristaj organizoj eksterlandaj. La leteroj povas esti skribitaj ankaŭ en ruslingvo, se neniu komjunulo en ĉelo scias esp-on. Traduko estas farata en distrikta oficejo por interligo, kiu registras la leteron kaj forsendas ĝin al la adresato. Respondoj venas ankaŭ pere de l' distrikta oficejo.

3. Oficejo por Intern. Interligo ĉe *Urbdistrikta Komitato de Komjunula Unuiĝo* (Adreso: Tver, Ugorkom VLKSU. of. por Int. Interligo). Tiu oficejo, tute simile al la antaŭa, organizas intern. koresp. de komjunulaj ĉeloj en urba distrikto (precipe en oficejoj kaj lernejoj ĉiugradaj kaj specialaj).

4. Intern. Fako de Komisio por Interligo ĉe *Tvera Kavaleria Lernejo,* kiu senpere korespondas en esp-o kun ĉiuj landoj, organizoj kaj apartaj SAT-anoj pri ĉiuj temoj.

La oficejoj ĉe GSPS kaj komjunulaj komitatoj ĵus komencis la laboron kaj vekas grandan intereson inter lab. amasoj pri intern. koresp. kaj esp-o kaj obstinaj skeptikuloj fariĝas defendantoj de esp-o.

Granda laboro estas farata nun en la ĉeloj kaj fabrikoj por agitado kaj organizado de *kolektiva* koresp. Oni skribas dekojn da leteroj.

Por ke la laboro havu sukceson — nin devas subteni eksterlandaj SAT-anoj. Ni bezonas grandegan kvanton da korespondantoj *el ĉiuj landoj.* Estu pretaj plenumi la peton de tveraj laboristoj interligi ilin kun diversaj lab. org. de okcidento kaj esti perkaj tradukantoj de plua korespondado, kiam esp-o disvastiĝas en Tver pli ol iam.

Intern. Fako de Komisio por Interligo en Kavaleria Lernejo funkcias jam 5 monatojn kun ne-atendita sukceso; lastjare partoprenis nur kelkaj K-doj, nunjare partroprenas *ĉiuj kurs- kaj ruĝarmeanoj de la lernejo.* Ĉiu eksterlanda letero estas uzata 100%, ĝia traduko pendas ĉie. Estas pendigita speciala kesto por individuaj respondoj kaj demandoj al eksterlandanoj. En ĉiun leteron oni enigas 20—25 demandojn de diversaj K. K. Ĉiu respondo al eksterlanda demando estas plenenhava kaj serioza, ĉar ĝin partoprenas tuta kolektivo.

Antaŭnelonge iu politika Inspektkomisio observis la laboron de la Fako, trovis ĝin treege grava kaj interesa, petis specialan artikolon por centra milit-politika gazeto "Voennij Vestnik" (Militista Informilo) kaj intencas proponi la organizadon de Intern. Interligo per esp-o al aliaj eroj de Ruĝa Armeo.

Tiel ni vidas la evidentajn rezultojn de la eksperimento: 1. Rapida neniigo de skeptikemo rilate esp-on. 2. Plej larĝa priservo pere de esp-o al lab. amasoj de Tver. 3. Kresko de intereso de peresp. laboro flanke de partiaj kaj sovetaj aŭtoritatuloj.

De eksterlandaj SAT-anoj ni atendas leterojn kaj helpon!

Adresoj: *Tver.* GSPS. Kultodel. Oficejo por Int. Interligo.

Tver. Fabrajkom VLKSU Oficejo por Int. Interligo.

Tver. Ugorkom VLKSU Oficejo por Int. Interligo.

Tver. Kavskola. Al administranto de Int. Fako *V. Varankin.* *V. Varankin.*

*

FERA GVARDIO DE SAT

(2-a ĉapitro de nekredebla romano, 1-an vidu en n-o 121—122)

K-do SAT-ano 5199 el Minsk infektis min (ankaŭ instruisto). Mi ĵuras, je la nomo de Tutmonda Oktobro[1]), brikdonadi (estas aldonita 6 dolaroj — por unu jaro antaŭe). Mi vokas Gek-dojn Alaŭdina, Cvetajeva, Graĉov, Kiselov, Lebedjev, Medvedeva, Nariŝkin, Ŝibajev, Ŝumarin, Vasiljeva (Ivanovo-Voznessensk), kaj aliajn konatulojn en aliaj lokoj. Mi petas provi, ke decido de K-do Fedorov estas nek facilanima nek malutila por SAT. *(3409).*

1) Revolucio 1917, 7. XI. aŭ 25. X. laŭ malnova stilo, kiu estis en Rusio.

*

KRONIKO

Aŭstrio

Köflach. — Post 3-monata kurso fondiĝis grupo de ALLE. Aliĝis 11 Gek-doj. Jan. 10. komenciĝis kurso por komencantoj; partoprenas 12 novaj K-doj. Jan. 19. la ĉi-tiea "Socialista Junularo" ankaŭ komencis esp. kurson. Ambaŭ kursojn gvid. H. Wakonigg (1366). Ĝis nun 3 novaj K-doj SAT-aniĝis. *1366*

Wien. — Feb. 2. okazis en Wien ĝeneralkunveno de la esp. grupo. "La Naturamikoj". Laŭ raporto de K-do Ĉech, la grupo ekzistas de post 1 jaro k. la membraro altiĝis de 30 ĝis 92 anoj. Dum la jaro estis 3 kursoj. Okazis ĉiudimanĉe ekskursoj, kun pli ol 850 partoprenintoj. La grupo interrilatiĝis kun 10 eksterlandaj grupoj el 5 landoj. Nome de la centra komitato, K-do Ziegler raportis pri laboroj de l' centro. Poste K-do Slezak, nome de l' Aŭstria Lab. Ligo Esp. salutis. Feb. 8. komenciĝis nova kurso por komencantoj.

Wolfsberg en Kärnten. — En nia valo ĝis nun ekzistis neniuj esp-istoj. Tial K-do H. Stocklmair intertraktis kun soc. junularo de Wolfsberg por aranĝo de esp. kurso. Jan. 22. okazis la unua kursvespero, kun 15 lern. *(6339)*

Francio.

Clermont-Ferrand. — La esp. lab. grupo estis antaŭ nelonge restarigata; ĝiaj anoj plejparte estas nefrancoj. Por instrui ni uzas "Petro'n". Nia propagando iom prosperas nun, sekve de anonco presita en gazetaro pri la VIII-a en Lyon. *D.*

Grenoble. — Sekve de kursoj sufiĉe bone vizitataj, kelkaj K-doj SAT-aniĝis. Ĉiusemajne la grupo kunvenas por traduka k. perfektiga laboro. Pli k. pli Laboristaro ŝajnas interesiĝi pri nia movado. *P. R.*

Lyon. — La lasta ĝenerala kunveno estis ĉeestata de pli ol 50 Gek-doj. Loka gazetaro publikigas regule niajn artikolojn; lab. asocioj el ĉiuj tendencoj morale k. mone helpas nin. Por multe rikolti dum k. post la VII-a, ni jam komencas semi: ni okazigas ĉiusemajne kunvenon, kies celo estas perfektigo en scio k. uzado de esp-o; ni legas k. diskutas pri sennaciismo. Bedaŭrinde, senlaboreco malhelpas nin, ĉar multaj K-doj fariĝus grupanoj k. SAT-anoj, se ili ne estus ĝenataj de nuna ekonomia krizo. La 5. feb. K-do 132 priparolis utilecon de esp-o por Proletaro. Jurnaloj raportis favore k. reklamis pri la VII-a. Ĉio esperigas, ke ni prezentos al kongresanoj viglan grupon, en aŭgusto 1927. *Grupestro.*

Romans. — La esp. lab. grupo konsistas nun el 15 viglaj K-doj; la 29. jan., ni organizis propagandan kunvenon en ĉefa lernejo de l'urbo. Paroladis K-do 132 pri "Esp-o kaj Laboristaro", pri SAT k. la VII-a. Enskribiĝis 12 lern. por nova kurso k. SAT-libroj grandnombre disvendiĝis. Kelkaj sindikatoj k. lab. organizoj subvencias nian grupon. *B.*

St. Etienne. — Esp. Lab. grupo bone funkcias; 10 lern. ankoraŭ sekvas kurson; 5 fariĝis SAT-anoj. *J. R.*

Tours. — En la ĉi-tiea malliberejo, pro lia propagando en la jaro 1925 kontraŭ la Maroka milito, sidas nia K-do SAT-ano Armand Couraut. Li profitas la okazon por ellerni la lingvon. Oni povas skribi al li. Adreso: Prison cellulaire de Tours, Detenu politique, *Tours,* Francio.

Valence. — La 30. jan. kunvenis la Esp. Lab. grupo de distriktoj Drôme k. Ardèche. Sukceso en instruistaj medioj. Nova plano por pli vigla agado. Kursoj malfermitaj dum pasinta vintro en 4 vilaĝoj. *M.*

Germanio.

Dresdena Industriregiono. — En jan. okazis la jarkonferenco de la LEA-distrikto en Radeberg. Ĉeestis pli ol 70 pers. El la raporto de la adm. estu menciata jeno. En jan. 1926, la distrikto havis 5 grupojn kun 135 membroj. Ĉe la jarfino ĝi konsistis el 9 grupoj kun 223 membroj. En aŭtuno ekster Dresden estis 300 gekursanoj k. en jan. ankoraŭ pli ol 200. La distrikto sukcesis enkondukigi esp-on en la popollernejo de Zschachwitz apud Dresden. Bedaŭrinde ankoraŭ staras ekster la distrikto Lab. Esp. grupoj, kiuj ne jam konsciiĝis pri neceseco de unueco, ekz. Dresden-Pieschen, Dr.-Johannstadt, Lausa k. Zschachwitz. Kiel gvidanto de la distrikto ankaŭ ĉi-jare funkcias K-do P. Köckeritz, Tharandter Str. 6, Dresden-A 28.

En la kadro de la jarkonferenco paroladis studkonsilisto K-do Lohmann, Radebeul, pri la temo: "La disvastigo de esp-o tutmonde kaj ĝia valoro". La penojn de SAT la parolanto precipe menciis. La fincelo devas esti la oficiala enkonduko de esp-o en la lernejoj.

Hamburg. — Ĉiuj Gek-doj de la Hamburga regiono estas petataj sendi siajn adresojn al SAT-peranto K. Harms, Alter Teichweg, 118, *Hamburg, 22.* Temas pri pli bona organizado de nia SAT-movado k. starigo de laborprogramo. *K. H. 761.*

Meissen. — Jan. 2. kunvenis 8 SAT-anoj en "Kaisergarten"; post vigla diskuto, oni unuanime decidis fondi SAT-grupon k. priparolis estontan laborplanon. Kiel peranto estis elektata K-do Fr. Ohniwas, anstataŭ K-do W. Hertel, kiu vivigis la lab. esp. movadon ĉi-tie, sed al kiu tempo mankas por daŭrigi. Nia membro-nombro duobliĝas en la jaro k. en la nuna kurso, laŭ "Petro", baldaŭ finiĝos 22 lern. k. espereble pligrandiĝos nia SAT-rondo. Sendaĵojn al: *Franz Ohniwas, Meissen-S,* Niederfährerstrasse N. 57.

Orient-Saksio. — Jan. 16. okazis en Filippsdorf bone vizitata konferenco de la sub-distrikto 1. Partoprenis Gek-doj el Gross-Schönau, Warnsdorf, Seifhennersdorf, Leutersdorf, Eibau, Neugersdorf. Unuanime estis elektata sub-distriktestro K-do Ullrich, Eibau. Vigla diskuto ekiĝis rilate propagandon, instruon k. presservon. La Gek-doj estonte estos devigataj partopreni ĉiujn lab. festojn, por tie propagandi esp-on. *Karl Krause, Warnsdorf,* protokolinto.

Holando.

Rotterdam. — K-do Riswick varbis ĉi tie jam 4 novajn SAT-anojn k. abonantojn al "S-ulo". Do ankaŭ ĉe ni la SAT-movado enradikiĝis! Kiam sekvos aliaj urboj, speciale *Hago?* *(670)*

Latvio.

Riga. — 30. 1. 27 okazis malfermo de la latvia Lab. Esp. Societo. La intereso pri la asocio inter la Laboristaro estas granda. La Societo de Lab. Sportistoj devidis ellerni esp-on k. saman decidon akceptis multaj komitatoj de Soc.-Dem. partio. Mi malfermos en diversaj lokoj kursojn por laboristoj. Jam enskribiĝis 30 homoj k. la nombro pligrandiĝas ĉiutage. La ejon por Lab. Esp. Soc. k. kursoj donas senpage profunuiĝo de PTT-istoj. La kunsidoj de la societo okazas ĉiudimanĉe en *Avotuiela 4.* Koresp-aĵojn por la societo adresu: *K-do A. Kazoks, Riga,* pasta kaste 703. *(6837.)*

Litovio.

Ŝiauliai. — Malfermiĝis 2 novaj kursoj por komencantoj k. progresintoj, en lerneja ĉambro, pruntita al la loka esp-societo de la magistrato. Gvidas *K-do M. Zakasansky.* *(8709.)*

Polio.

Lodz. — Je 2½ jara malliberiĝo estas kondamnita SAT-ano Antoni Nacewski *(5981),* pri kiu jam estis skribite en n-o 114 de "S-ulo", pro partopreno al la unumaja manifestacio en jaro 1926. Ĉe nia lasta kunveno, estis proponite, klopodi por iel plimildigi al K-do N. lian sorton. Ĉiuj Ge-SAT-anoj deziru al li kuraĝon!

Sovetio.

Brjansk. — En loka junular-gazeto, "Vojo de Junularo" (Putj Moladeji), ĉiuj niaj artikoloj estas de la Red. akceptataj. En N-a regimento por militkomunikado, esp-a kurso funkcias; partoprenas ĉirkaŭ 30 ruĝarmeanoj; gvidas K-do *Anonimov.* *(5112.)*

Samara. — Ĝis feb. 1-a al SEU aliĝis 98 K-doj k. al SAT 20. Nunjare ĉe ni disvastiĝas esp.-movado en vilaĝoj. Ekzistas 8 lokoj en distrikto, kie troviĝas rondetoj aŭ apartaj interesiĝantoj pri la lingvo. Baldaŭ (6. 11. 1927) estos nia unua gubernia konferenco de esp-istoj. Niaj partiaj organizoj komencas interesiĝi pri la movado. Nun organiziĝas rondeto ĉe Ligo de Ateistoj. *(5913.)*

Velij. — Post raporto de *K.do 6766* pri esp-o k. nia VII-a, 3 rondetoj stariĝis (40 partopren.), gvidataj de K-doj *5513* k. *6771.* Unu funkcias ankaŭ ĉe la Pedagogia Teknikumo. Ĉe la junularklubo, estas aranĝita sanĝiĝanta ekspozicio. *(6771.)*

Svisio.

Zürich. — En Zürich fondiĝis Lab.-Esp.-Grupo, filiiĝinta al LEA por germ.-lingvaj regionoj. Jan. 12. 1927, la grupo malfermis kurson (14 lern.), gvidata de SAT-ano. *1446.*

Jubileo-Ĉeno[1]

Pavlik (Wien) 1 ŝil.; *Jurke* (Wiesa) 2 mk. g., alvokas siajn koresp-antojn. *Stöckl* (Innsbruck) dediĉas 10 ŝil. kiel saluton kaj respondon al W. kaj St. Michaliĉka. *Morell* (Barcelona) 6 pes.; *Bretthorst* (Wanne) 1 mk. g.; *Lvov* (Zinovjevsk) 0,50 rubl.; *Klubo* (London) 5/10 ŝil., responde al la alvoko de la Glasgowa Grupo, alvokas la Odessa-n esp. grupon. *Lepage* (Monts) 5 fr. fr.; *Atomo Avrunin* (Kremenĉug) 2 mk. g.; *SAT-grupo* (Ĉita) 1 rubl., alvokas ĉiujn grupojn, kiuj korespondas kun ĝi superi ĉi-sumon. *Niederhametner* (Wien) 1 ŝil.; *Hirtenberger* (Wien) 1 ŝil.; *Glizer* (Wilno) 2 zlot., kiel respondon al Goldfeder, samtempe alvokas Galpetin kaj Verhaftik (Wilno). *H. Enghardt* (Nadeĵdinsk) 1 mk. g., alvokas W. Enghardt (Leipzig). *Böhmer* (Nadeĵdinsk) 1 mk. g.; *Bosma* (Amsterdam) 1 guld.; *Fuchs* (Den Ilp) 1 guld.; *Benjamin* (Amsterdam) 2,50 guld.; *Kazoks* (Riga) 1 lat.; *Maslenko* (Brjansk) 1 rubl., alvokas Golikov (Vitebsk). *Prol. Esp. Grupo* (Dresden-Pieschen) 5 mk. g., kaŭze de la alvoko en la gazeto "Arbeiterstimme" (Dresden) flanke de "Arb. Esp. Distr. Ostsachsen", ni alvokas K-dojn Bernard (Marseille) kaj Varankin (Tver).

[1]) Vidu la n-on 100 de "S-ulo".

Ĉe la Neŭtraluloj.

Agentejo Reuter sciigas, ke esp-anta banko, kiu eldonas siajn proprajn biletojn, estas starigita en la urbeto *Lazen* en Nederlando. Ĉi tiu ne estas la unua esp-anta banko; germano starigis unu antaŭ la milito, sed ĉi tiu lasta ĉesigis la entreprenon.

LA PLEJ GRANDA HISPANA LEKSIKONO KAJ ESPERANTO

(77) La ekzemplo de la granda hispana leksikono "Espasa" estas signifa. En tiu ĉi monumenta verkaĵo ĉiuj vortoj de l' nomenklaturo estas akompanitaj de traduko en pluraj lingvoj *kaj en esperanto.* *I. E. S.*

ESPERANTO ĈE LA BLINDULOJ

(84) Esperanto estas instruata en preskaŭ ĉiuj blindul-lernejoj de la mondo, ĉar la presaĵoj en reliefa Braille-skribo estas tre multekostaj kaj ilia nombro tre limigita en ĉiu lingvo. En esperanto la blinduloj de ĉiuj landoj havas sufiĉe konsiderindan komunan literaturon kaj tre disvastigitan internacian revuon. La unua Radio-ĵurnalo por blinduloj en esperanto ĵus estas eldonita de la eldonejo Chiron en Parizo. *I. E. S.*



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Norda Vento (Novelkolekto), serio Biblioteko Tutmonda, n-oj 7—8. El la hungarlingva verko de Frederiko Karinthy, tradukis Karlo Bodó. Eld.: Rudolf Mosse, Berlin. Formato: 17×10½ cm., 95 pĝ. Prezo ne montrita.

En ĉi-libro, Frederiko Karinthy antaŭparolas laŭde kaj entuziasme pri esp-o. Sed... por la traduko li sin apogis sur alian personon, kiu siavice opiniis necese uzi pli ol 50 neologismojn kaj finlibre ilin traduki espen! Tamen.. estas ankoraŭ tempo por pentofarado kaj mi esperas renkonti estonte *esp-ante verkitajn* noveletojn tiom interesajn, kiaj estas la 15 en ĉi-tiu libro. Elstaras en ili ĉefe la imag-kapablo de l' aŭtoro, kelkfoje apenaŭ bridita, ĝis la senspira leganto komencas suspekti, ke li celis nur kaprice sensacian efikon. Sed tiu ideo forpasas post plua legado de tiaj tute raciaj skizoj, kiel: "Korpa Beleco", pritraktanta la malkontenton de mortinto, nun pura spirito, kiu vidas denove la fizikajn ĉarmojn de amitino; "Anasrostaĵo", priskribo de l' lasta viv-horo de anaso plej bona vegetarana propagando! — kaj "Abu Kair", ridiga, kvankam funebre stranga fantaziaĵo pri freneziĝinta ŝak-ludisto. *E. K. L.*

Oficiala Klasika Libro de Esperanto de Esperantista Akademio, itala, hispana kaj portugala partoj. Eldonejo: Esperantista Centra Librejo, *Paris 9-e,* 9½×15 cm., 118 pĝ. Prezo: ne montrita.

La Esperantista Akademio sukcesis "elĵongli" la italan, hispanan kaj portugalan partojn. Ni esperu, ke la pluraj eldonoj (en aliaj lingvoj) baldaŭ aperos; ĉu la neŭtrala movado ne povus pagi por ili anstataŭ ekz. por senbezonaj vojaĝoj? Estas vere lasta tempo por ke la Klasika Libro aperu en ĉiuj aliaj lingvoj. *S. K.*

Sprechen Sie Esperanto? Einführung in die Esperanto-Konservation. Bearbeitet von *Dr. Emile Pfeffer.* Tagblatt-Bibliothek n-o 426. Eldonejo: Steyermühl-Verlag, Wien 1927. 12×19 cm. 52 pĝ. Prezo: 0,25 mk. g.

Bela, malkara eldono rekomendinda al german-parolantoj. Ni bedaŭras nur, ke la aŭtoro uzas multe da novaj, superfluaj kaj malakceptindaj radikoj: agnoskitas, fuajero ktp. *S. G.-K.*

La Sonĝo de Makaro de V. Korolenko, el la rusa tradukis M. Ŝidlovskaja. Biblioteko Tutmonda n-o 9. Eldonejo: Rudolf Mosse, Berlin. 10×17 cm., 48 pĝ. Prezo: ne montrita.

Mi ne scias, kiun pli laŭdi, ĉu la aŭtoron ĉu la tradukistinon. La libreton vi certe tralegos senhalte, tiom flua kaj tute natura estas la lingvo. Mi nur ne ŝatas: ekŝanĝbrili, arbarprospekto (?). *S. G.-K.*

Pilgrimo poemaro de Julio Baghy, Eldono de la aŭtoro, Budapest 1926, 12×16 cm., 124 paĝo. Prezo: 1,40 pengo.

Mi tre bedaŭras, ke la loko ne permesas al mi pli profunde priparoli la libron, kion ĝi meritus. *Poeto* kaj *Muzo* kaj *Splitoj* pleje plaĉis al mi. Mi komprenas Baghy'n malfeliĉan, plenan de pesimismo. Ĉu la t. n. "esperanto-movado" ne sufiĉe donas okazon por tio? Legu la paĝojn kaj vi trovos tiom da vero, da suferoj kaj ni komprenos la — "vivon" kaj la "mondon"... Kaj la poeto ĝojos, ke ne sola li estas. — *S. G.-K.*

La Lingva Angulo

Demandoj:

1. Ĉu oni devas diri: Estas danĝere ludi kun la fajro", aŭ "— per la fajro"? 6971.

2. *Ĉu estas ia diferenco inter la vortoj* ega *kaj* granda? *Ekzemple, ĉu oni same korekte povas diri:* vilaĝego *aŭ* granda vilaĝo?

Sama demando pri eta *kaj* malgranda.

3. *Fruictier en sia Esperanta Sintakso (vidu "La Lernanto"n n-o 43) diras: "Estas agrable al mi, ke vi aĉetis tiun domon. Tie ĉi 'ke vi aĉetis' estas la subjekto."*

Niaopinie li malpravas ĉar "ke" ĉiam montras komplementon de la subjekto. *(357).*

Respondoj:

1. KUN montras la akompanon, neniam la ilon; vi do devas diri: "ludi per la fajro". Ne lasu vin erarigi de la franca aŭ germana lingvoj, kiuj uzas la prepoziciojn AVEC aŭ MIT (= kun) por montri la ilon.

2. Estas eraro kredi, ke la sufiksoj EG kaj ET simple kaj ĉiufoje egalvaloras kiel la vortoj GRANDA aŭ FORTA ka. MALGRANDA aŭ MALFORTA. Ili montras la plej altan aŭ plej malaltan *gradon* en ideo aŭ afero *diferenca* je tiu, kiun montras la nura radiko. Pro tio la vortoj kunmetitaj per EG kaj ET ĝenerale korespondas al tute alia vorto nacilingva ol la simpla radikvorto. Ekz.: MONTETO ne respondas al MALGRANDA MONTO, sed al io alia, kvankam parenca, -hill; colline; Hügel; colle. VENTEGO ne estas FORTA VENTO, sed respondas al: storm; Sturm; tempête; tempesta. Tiuj sufiksoj do aliigas kaj specialigas la signifon de la radiko.

Al sama demando jam tute trafe respondis MOGO en SENNACIULO, 12 febr. 1925. Mi konsilas al vi legi tiun artikoleton. Jen kelkaj aliaj ekzemploj: VILAĜEGO, borough, market-town; bourg; Marktflecken; borgo. VARMEGA, hot; brûlant; heiss; ardente. UNGEGO, clow; griffe; Kralle; artiglio. PETEGI, to supplicate; supplier; flehen; supplicare. BRULETI, to smoulder; couver; glimmen; covare.

Mi atentigas vin pri la samtema respondo de Zamenhof, citita de MOGO.

3. Ne Fruictier, sed vi tute malpravas, malpravegas. Via aserto, ke la vorto KE *ĉiam* montras komplementon, estas fantazia, tute nekomprenebla aserto, al kiŭ mankas ia ajn eĉ nur ŝajna motivigo. La citita frazo egalvaloras kiel: "Tio, ke vi aĉetis la domon, estas agrabla al mi." La propozicio kun "ke" estas la enhavo de la subjekto TIO. *Fakulo.*

★ DIVERSAĴOJ ★

Fondiĝis *Internacia Asocio Biokosma*, "kiu celas ekskluzive serĉi kaj evidentigi ĉion, kio povas komprenigi al homoj, ke ili formas nur unu grandan familion, en kiu neniu el ĝiaj membroj povas suferi, ne suferigante la aliajn". Tiel estas dirite en esperantlingva alvoko senpage dissendata.

Interesiĝantoj povas ricevi informojn, skribante al la Ĉefsekretario: *F. Monier*, chemin de la Vallée-aux-Loups, *Chatenay-Malabry* (Seine) Francio.

INTER LA VEGETARANOJ

La 12-an de februaro, en Leningrado, estis ĝenerala kunveno de vegetara societo (kolektiva ano de SAT). Oni decidis reorganizi la societon, starigi la principon de kreskaĵa nutrado je fundamento scienca. Inter la aliaj direktivoj donitaj al la nova administracio de la vegetara societo estas ankaŭ tiu pri la firma kunligo kun aliaj vegetaraj kaj sciencaj asocioj en Sovetio kaj eksterlando por komuna prilaboro de problemoj pri saniga nutrado.

Ja Brukson (1896).

RADIISTOJ ATENTU!

Ĉiumerkrede, el urbo Moskva, je la 22-a horo, laŭ MET per Radiostacio, je la nomo de Komintern (ondlongo 1450 metr.) okazos esperanto radio disaŭdigoj, kiuj estos aŭdeblaj en tuta Eŭropo.

Oni petas ĉiujn aŭskultintojn *nepre* informi pri la impresoj kaj aŭdebleco laŭ adreso: *Moskva, Poŝtkesto N 701, Al Centra Oficejo de Esperantistoj de Ligilo.*

Ĉi tiun anoncon bonvole represigu en viajn gazetojn kaj ĵurnalojn kaj la specimenojn (aŭ eltranĉaĵojn) sendu al ni.

Viktor Javoronkov.

NATURAMIKOJ

Kaŭze de mia peto en Sennaciulo, n-o 114-a, alvenis je la kongreso de la Ned. Lab. Vojaĝ-Unuiĝo (Naturamikoj) dekoj da leteroj el tuta Eŭropo. Multan dankon al ĉiuj sendintoj.

La rezulto estis bona. La kongreso akceptis la proponon pri esp-o. Pro tio la Redakcio de la organo estonte ne plu povos rifuzi la enpresigon de priesp-aj artikoloj, kiel ĝi faris ĝis nun. *670 (Enschede).*

*

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo".

Väst-Svenska Kuriren, ?, 15. 1. 27: "Kiel oni laboras en Nederlanda Indio" k. "Sciigoj el Siberio". — *Po-Volnoŝĉ*, Varsovio, n-o 3 (36): "Barbaraĵoj en Sovet-Siberio" (111) kun antaŭnoto alloga k. praktike informa pri "S-ulo" de K-do Zawada. — *Nasza Wolnoŝĉ* (nova *Po-Volnoŝĉ*), Varsovio, n-o 1: Respondoj pri "Barbaraĵoj en Sovet-Siberio" (115, 123) k. artikolo interesa pri la temo de K-do Zawada. — *L'Effort*, Lyon, 15-2-27: "Klasa justeco en Germanio" (119), ("S-ulo" ne menciita kiel fonto, sed *Prolet-Informservo*) kaj "Nova edziĝa kodo en USSR." (103). —

Represis el "Sennacieca Revuo".

Molodij Krestjanin, Ĉita, 22-1-27: "Janko — junpioniro". — *Po-Wolnoŝĉ*, Varsovio, n-o 19: ??

Enhavis Notojn pri SAT.

Kirjatjö-Bokarbete, Helsinki, 1-1-27: 6-pĝ. artikolo (6 bildoj) pri dum-kongresa vizito al Leningradaj tipografistoj. — *Lyon Républicain*, Lyon, 7-2-27: propagando pri VII-a kongreso k. esp. ĝenerale. — *Le Cri du Peuple*, Lyon, 12-2-27: pri VII-a kongreso. — *Po-Wolnoŝĉ*, Varsovio, n-o 23. —

Enhavis priesperantajn artikolojn.

Molodij Bilŝovik, Kiev, 5. 2. 27: Leciono.

Enhavis tradukaĵojn el esperantaj Leteroj.

Le Cri du Peuple, Lyon, 12. 2. 27 k. 5. 1. 27. — *Molodij Bilŝovik*, Kiev, 27. 1. 27. — *L'Effort*, Lyon, 15. 2. 27.

*

MEMORNOTO PRI MEMORNOTO

K-doj kiuj sendas ĵurnalojn por la rubriko MEMORNOTO, tre helpus en ĝia kompilo, se ili videble ĉirkaŭsignus la koncernan artikolon kaj apude skribus esp-e: a) la titolon de l'ĵurnalo, b) la urbon de eldono, c) la daton de eldono, d) la temon de l rubriko aŭ la titolon, se tradukita artikolo, e) la numeron de "S-ulo" aŭ "S. R." el kiu tirita estas la traduko.

Kelkaj K-doj traktas modele la alsendon, sed aliaj ne nur devigas longan serĉadon tra numeraroj de "S-ulo" kaj "S. R.", sed eĉ sendas ĵurnalojn presitajn per tute nelegeblaj por ni literoj, kun rezulto, ke ni devas aŭ diveni la informon per kelkaj hazarde rekoneblaj vortoj, aŭ flanken meti la ĵurnalon kiel ne-uzeblan. *Kompilantino.*

*

NIA POŜTO

S. G. (Kremenĉug). — *Ĉu do vi ne legis la n-ron 123/124 de "S-ulo"? — Vian laste senditan manuskripton ni ne povos uzi. Tiaj agitecaj, tro vortecaj artikoloj ne taŭgas por la SAT-anaro, kiun ni devas eduki per konigo de bone kontrolitaj faktoj. Mi konsilas, ke vi pli detale studu la historion de Francio k. de kelkaj aliaj landoj pri kiuj vi havas iome fantazian opinion. — Ni ankaŭ petas, ke vi skribu pli legeble.* — Red.

Al Kelkiuj. — *La Redaktejo de "S. R." kuŝas en Moskvo, ne en Paris. Notu tion bone en la memoron.* — Red.

3939 — 259 — *k. a.* — *Tiaj anoncoj rilatas unue al la* Adm. *de "S-ulo", ne al la* Red. *Vi forgesis, ke la presistoj ne laboras senpage.* — Red.

M. T. (Lublin). — *Alvenis viaj skribaĵoj, kiujn ni transsendis al la* Red. *de "S. R." (Moskvo). — Via p. k. ne estis sufiĉe afrankita k. ni devis pagi punafrankon.* — Red.

6319. — *Loko absolute mankas por enmeti tiajn rezoluciojn. Vi simple interrilatu kun la gvidanto de la Fako, kies tasko estas decidi kio estas sciigenda al la tuta Legantaro.* — Red.

Al Multaj. — *Ne uzu la rubrikon* Kroniko *por enŝovi senpagajn korespondanoncojn. La SAT-kaso ne permesas tion. Tro da K-doj forgesas, ke "S-ulo" estas la pli malkara el ĉiuj esp-aj gazetoj, kaj tamen la presistoj ne estas la malpli kare pagataj.* — Adm.

1116 *k. a.* — *Tro grandnombre alvenis "mallaŭdoj", pro tio ni decidis ne plu enmeti tiun rubrikon.* — Red.

1882. — *Ni povos uzi vian tro longan manuskripton nur en okazo de nepra bezono. Bonvolu estonte afranki sufiĉe viajn leterojn. Ni devis pagi 1,80 fr. kiel punafrankon.*—Red.

Monastirsky G. — *Respondon al via demando vi povas legi en la Jarlibro, pĝ. 28.* — Red.

*

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Britio.

— Gek-doj k. alianduloj, kiuj vizitos Anglion, bonv. informi la sekretarion de "Lab. Esp. Klubo". 114, Duke St., Stretford Rd., *Manchester* pri sia alveno.

Ĉekoslovakio.

K-do *Josef Purmann* ĉe Eichmann, *Arnau a. E.*, dez. koresp. k. ĉ. l. L, PK, PI, PM. Resp. garantiata.

Germanio.

K-do *Karl Berthold*, Markt, 31, II., *Halle a. S.*, dez. koresp. pri lab. temoj k. ĉ. l., L, PK, PI, bfl.

K-do *Otto Moritz*, Hasslocher Str. 61, *Rüsselheim* (Hessen), dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l., L, PK, PI.

K-do *Heinrich Rieffel*, Weinbergstr. 20, *Rüsselheim* (Hessen), dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l., L, PK, PI.

K-do *Karl Reinheimer*, Dr.-Ludwig-Opel-Str. 4, *Rüsselheim* (Hessen), dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l., L, PK, PI.

K-do *B. Siegert*, Herrenstr. 22, *Schweidnitz i. Schles.* interŝ. PM, PI, gaz.

K-do *Karl Hörner*, Polsumer Str. 215, *Buer-Hassel i. W.*, dez. interŝ. PI, k. ĉ. l.

K-do *O. Fehse*, Dehnhaide, 15, II., *Hamburg*, 22, dez. koresp. k. ĉ. l. L, PI.

K-do *G. Nitzsche*, Zwickauer Str. 152, *Chemnitz i. S.*, dez. koresp. pri lab. vivo, movado, prol. kulturo ktp. k. ĉ. l. PK, L, PI. Interrilatus kun Labeskoj.

Sovetio.

— Grupo de junaj pioniroj dez. koresp. kolektive aŭ individue, L, PK, PI, interŝ. presaĵojn. Adr.: K-do *B. I. Ŝipilin*, Nezamoĵnaja, 2 k. 10, *Dnepropetrovsk.*

K-do *Oka fumio*, Proletarka, 172, kv. 1, *Tver*, pri knab. k. prolet. movadoj, ktp. k. ĉ. l.

K-do *G. Ĝernenko*, Pervomajska, 14, *Kremenĉug*, dez. koresp. k. ĉ. l. precipe kun junularo k. fervojistoj, L, PK, gaz. Nepre resp.

K-do *A. Smirnov*, Sverdlov-str. 1, *Kremenĉug*, pri ĉ. temoj, k. ĉ. l. PK, PI, gaz.

K-do *G. Ŝlipper*, Jel. dor. Ŝkola, *Kremenĉug*, dez. koresp. k. ĉ. l. precipe kun junularo k. fervojistoj. L, PK, gaz. Nepre resp.

K-do *A. Tanner*, Poŝtkesto, 45, *Batum*, (Kaŭkazo) dez. koresp. per kolor. PI, k. ĉ. l., prefere ekstereŭropanoj.

K-dino *Kostovecka*, (gvidantino de pionirtaĉmento), Lvovska, 9, 4, *Kiev*, dez. koresp. k. ĉ. l.

K-dino *Heleno Sogolova*, Konstantinovska, 8, 2, *Kiev*, dez. koresp. k. ĉ. l.

K-dino *Olja Golder*, Kozlovska, 4, 4, *Kiev*, dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *Leo Zelenuk*, (komjunulo) Sverdlova, 2, 33, *Kiev*, dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *V. Juŝmanov,* Prosp. Lenina, 101, *Krasnouñmsk* (Uralo) dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. precipe kun Svedio, Usono, Argentino, Ĉinio, Japanio.

K-do *Petrov Severiano,* (18 j.) Gub. Centr. Biblioteko, Murmansk, dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *Aleksandro Penĉalov,* Lesnaja, 19, *gor. Rodniki* (Iv.-Voz. gub.) dez. koresp. pri ĉ. vivdemandoj, precipe pri etikaj, k. ĉ. l. L.

— Grupo de kursanoj por perfektiĝi en la lingvo dez. koresp. kun eksterl. Gek-doj. Adr:. *A. F. Penĉalovu,* Lesnaja, 19, *gor. Rodniki* (Iv.-Voz. gub.).

— Ĉelo de IRH (Jaĉejka MOPR) dez. koresp. kun eksterlando. Adr.: *Moskvo, 44,* Petrovka, 3, Elektrolank. *Jaĉejke MOPR.*

K-do *S. T. Grigorjev,* 1 Antropovskij per., 4, kv. 8, *Moskvo, 6,* dez. koresp. pri stenografiaj temoj.

K-do *V. Kremjanski,* (lernanto 18 j.) Jakovlevskij per. 13, kv. 7, Moskvo, 64, dez. koresp. kun geesp-istoj pri div. temoj.

K-do *M. P. Revenko, Poŝtagentejo Suñov, 2,* Stalingrada gub. dez. koresp. pri ĉ. temoj, k. ĉ. l. L, PK, PI.

K-do *A. Ketov,* Sennoj per. 45, *Ustkamenbogorsk,* Semipalatinskoj gub., dez. koresp. k. ĉ. l., precipe kun instruistoj.

Usono.

K-do *John Meiner,* 1143, Holton Street, *Milwaukee* (Wisc.) dez. koresp.

INFAN-KORESPONDADO

Al ĉiuj korespondantoj de l' Informservo de SAT (ekstersovetiaj).

Karaj Kamaradoj!

Kiel vi vidas el la suba listo, inter la infanaro sovetia, organizita en kom. infangrupoj, la ideo pri korespondado kun tutmonda proleta infanaro fariĝas tre populara.

Sed necesas, ke pri la ebleco de korespondado sciu la organizita proleta infanaro ĉiulanda. Por tio klopodu pri la enpreso de l' suba listo en la proleta gazetaro. Aldonu informojn: kiel organizi la korespondadon *pere* de via loka (aŭ regiona) informejo. Iniciatu la fondon de specialaj korespondejoj (tradukejoj) en la proletaj infan-organizaĵoj.

Ruĝfrate,
Esperanto-Servo.

Amikoj! Publikigu ĉi-liston en ruĝa gazetaro!

Komuniku la adresojn al viaj revoluciaj infan-organizoj!

La esp-istoj peru la interrilatojn kaj instigu la infanojn mem ellerni esp-on.

1-a Listo de korespondemaj infan-organizoj de USSR (per SAT-aparato)

Kremenĉug. — Oni bezonas korespondantojn por 30 taĉmentoj de junaj pioniroj-leninistoj —! Sendu ĉion al *Dietbiuro* pri *Okruĵkome LKSMU-Kremenĉug.* Por esperanto-korespondejo.

Smolensk. — Oni bezonas korespondantojn por 370 lernantoj de laborlernejoj, por 34 taĉmentoj de jun. pioniroj, por 19 ĉeloj de kom. junularo! — Sendu ĉion al: K-do *L. Genŝaft* — Nikolska, 3/2 — *Smolensk.*

Odessa. — Por la korespondemaj junular-ĉeloj k. pionir-taĉmentoj de Odessa sendu al: K-do *J. Genesski,* Str. Komintern, 21/10.

Djankoj (Krimeo) por pionira taĉmento al: K-dino *M. Grabenko,* Juĵn. j. d. *Djankoj-*Dom n-o 1, kv. 4.

Taŝkent (Mez-Azio). — La taĉmento "Volodarski" (50 inf.) estas perata de K-do Koblov — Adreso: *Taŝkent,* ug. pr. Karl Marx-Lenin, Vost. Fakultet S.A.G.U., Pionir-taĉment.

Kiev. — a) 60 geknaboj el laborlernejo n-o 80. Sendu ĉion al: a) Kieva Taĉmento de lernantoj-esperantistoj, *Kiev,* Pl. Spartaka 4a, Trud. Ŝkola n-o 80.
b) La 6a laborlernejo (1500 gelernantoj). — Sendu al: D. Viktorov-Ĉeñoviĉ, *Kiev,* Klovski Spusk, n-o *2* (por VI-a laborlernejo).

Dnepropetrovsk. — Pluaj junular-ĉeloj k. pionir-taĉmentoj. Adreso: *Dnepropetrovsk,* Pr. Karl Marx, 98/11 — Gub. Komitet Esperantistov — K-do Ŝiplin.

Perm (Ural-regiono). — Por la pionir-oficejo distrikta k. 2 taĉmentoj sendu al: Redakcia "Zvezda", *Perm.*

Irkutsk (Siberio). — Sendu al poŝtist-infana pionir-taĉmento: *Irkutsk,* Klub Rabotnikov Svjazi. — *Pioner-otrjad.*

Blagoveŝĉensk (Ekstrem-Oriento). — Por 250 gelernantoj akceptas: K-do *A. Borisoglebski,* Pedagog. Teknikum, Krestjans. 1. Por 600 lernantoj sendu al: K-do *Gromov,* Poĉtamts. per., semiletka.

Kaluga. — Por la lernantoj de l' 8-a Laborlernejo sendu al: K-do *Kiriuŝin,* 8-a Sovet. Ŝkola, Zolotarevska, 2, *Kaluga.* —

Ĉerkassi. — Por pionir-taĉmento de laborlernejo sendu al: I. Ermolajev, Str. Karl Marx, n-o 18 — *Ĉerkassi* (Ukrainio).

Publikigu! Miloj da infanoj estos dankemaj al vi!

Krom korespondaĵoj la geinfanoj deziras interŝanĝi poŝtkartojn, ilustraĵojn, infangazetojn, markojn ktp.

Ni bezonas milojn da peresperanto-korespondantoj en tutmondo.

Bonstila, belilustrita, riĉaspekta kaj diversenhava estas la sola teknika gazeto

Internacia Radio-Revuo

Organo de la Internacia Radio-Asocio

KONSTANTAJ FAKOJ:

Mi konstruas — Paŝo post Paŝo — (originale popularigata teorio de Radio) Radiohumoro — Intern. Radio-Vivo — Tra la Radio-Gazetaro — Esperanto por Radio, Radio per Esperanto — Internacia Radio-Asocio k. a.

Premio por ĉiuj abonantoj:

Kolortabelo de 99 Skemoj — Konkurso kun multnombraj premioj, (i. a. kompleta radio-ricevilo, lutilaro k. multaj radiaĵoj).

ABONPREZO (por 12 n-oj): Unu dolaro aŭ egalval. en nacia mono. Petu de la eldonejo la tabelon de favoraj prezoj, de naciaj agentejoj kaj la kondiĉojn de konkurso.

Eldonejo:

Etienne Chiron, 40, rue de Seine, Paris VI.

Dnepropetrovska (Ekaterinoslava) Oficejo por Internacia Korespondado

serĉas regulajn koresp-antojn precipe inter Laboristaro (kolektivan aŭ personan) el ĉ. landoj pri jenaj demandoj: ĉiutaga lab. vivo, profesia, politika k. ekonomia stato de landoj, kom. k. kom-junulara movadoj, partiaj demandoj, intern. ruĝa helpo (IRH.), sporto, radio-amatoreco, lab. kluboj, tekniko, arto, literaturo ktp.

Ĉiujn koresp-aĵojn oni utiligos por lokaj gazetoj k. por kolekt. interkoresp-ado kun fabrikaj kolektivoj. Al ĉ. sendantoj ni garantias resp. Oni ankaŭ akceptas por interŝ. gazetojn (esp.-naciaj), librojn, afiŝojn ktp. — Koresp-aĵojn sendu al: *Esperanto-Komitato de SEU,* (por Labesko), str. K. Markso, 98, loĝ. 11, *Dnepropetrovsk,* Ukrainio (Sovet-Unio).

INSTRUISTOJ via gazeto estas INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

oficiala organo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE)

Gazetabono: 2,50 mk. g.

Kotizo al TAGE: 0,50 mk. g.

Specimenon petu de **M. Goldberg,** Frohburger Str. 68, p., Leipzig S 3 (Germ.)

Peto

La eldonata en Dnepropetrovsk (Ekaterinoslav) ĵurnalo de lab-kamparana junularo: "Majbutnja Zmina" (Estonta Ŝanĝo) sin turnas al ĉiuj lab-korespondantoj kaj kom-junularo sendi al ni artikolojn, let. fotojn ktp. pri vivo de lab-kamparana junularo, kaj pri laboro de komjunul-organizaĵoj.

Taŭga materialo aperos en "Majbutnja Zimna" kaj la artikolverkintoj ricevos honorarion kaj aŭtorajn n-rojn. Adr.: *"Majbutnja Zmina",* Prosp. K. Marksa, 106, *Dnepropetrovsk.*

K-do Stefanoviĉ Konstantin

(fervojisto - kom - isto), Poŝtkesto, 1, *Ĉita* (Siberio) Sovetio, dez. koresp. pri vivo de lab-istoj kaj soldatoj, pri moraro kaj turismo kun ĉ. landoj. Resp. senprokrasta!

Laborista Klubo de

TEKSISTOJ

petas eksterlandajn samprofesianojn skribi esperante pri profesia movado kaj kultura laboro en laboristaj kluboj. Skribu nepre legeble, pli bone skribmaŝine. Ni respondos precize, baldaŭ kaj sufiĉe.

USSR. Nara-Fominsk Mosk. gub., Raborij klub tekstilsĉikov, al sekcio de esperanto

ATENTU!

Ĉelo de Int. Ruĝa Helpo (MOPR) ĉe Moskva Teknikumo de Ligilo (Moskvo, 66 — USSR., Gorofiovskaja 16), tre petas ĉiujn kamaradojn kaj org-aĵojn sendi al ĝi diversaĵn materialojn pri laboro, de IRH. en eksterlando, blanka teroro, revolucia movado ktp. Estas tre dezirindaj fotaĵoj, gazetoj, plakatoj k. s. Ĉiuj materialoj estas uzotaj kun granda danko en kunveno de IRH. en Teknikumo.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)